



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Februaro 2017 n-ro: 14



## Merhaba!

Ŝubat sayımızla karŝınızdayız. Bu sayıda okumanız için çok çeŝtli yazılar topladık.

Bir önceki seri romanımız bittiğinden orta seviyede yeni bir seriye başladık. Claude Piron'un "Dankon Amiko" adlı romanı.

Felsefe tarihine ünlü filozof ve bilim adamı Pascal ile devam ediyoruz.

Ŝubat ayının önemli günlerinden birisi 21 Ŝubat günü kutlanan "Uluslararası Ana Dili Günü". Bu günün hikayesini bu sayımızda okuyabilirsiniz.

Bunun dışında bu sayımızda bolca okunacak hikayeler, fıkralar, ŝiirler ve Esperanto dünyasından haberler mevcut.

UEA tarafından 1999 yayınlanan "Biz kimiz ve neyi hedefliyoruz" adlı kitabı seri halde yayınlıyoruz.

## Herkeseye iyi okumalar !

## Saluton!

Ni denove estas kun vi en nia februara numero. En ĉi tiu numero ni kompilis diversajn legaĵon por via legado.

Ĉar nia antaŭa seria romano finiĝis nun ni komencas serie publikigi la romanon de Claude Piron "Dankon Amiko".


En nia angulo "Mallonga Historio de Filozofio" ni daŭras kun l fama scientisto ka filozofo Paskalo.

Ni prezentas la historion de la "Internacia Tago de la Gepatra Lingvo" kiun ni festas en la 21-a de februaro.

Plue ni prezenatas al vi multajn rakontetojn, ŝercojn, poemojn, kaj novaĵojn el Esperantujo.

Ankaŭ ni serie komencis publikigi la libron "Kiu ni estas kaj kion ni celas" de UEA publikigita en la jaro 1999.

## Bonan legadon al ĉiuj!



### TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds



## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Nazim Hikmet Poezia Antologio	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de geamikoj	4
Morto de la Punĝaba lingvo	4
Rezolucio de la 6a Afrika Kongreso	5
La 10 plej gravaj okazaĵoj en Esperantujo	6
Alvoko por donacoj al la Volontula Servo	7
16 novaj premiitoj en la panteono	8
Ŝanĝis la statuto de UEA	9
La nova Pasaporta Servo aperis	9
Anda de Andoj (fabelo)	10
Okaze de la Libro Tago anonco de ILEI	10
Ŝercoj	12
Kruĉvortenigmo	12
Alvoko por labori por la Afrika Oficejo de UEA	12
Hajkoj de Elena Popova	14
Stela Ŝalo (rakonteto)	14
La ĉefaj revuoj en Esperantujo	15
Kio ni estas kaj kion ni celas (1)	16
Mallonga Historio de Filozofio (13)	18
El la libro de "Dao de Jing" (7)	19
Mesio de Händel en Esperanto	19
Dankon Amiko (1)	20
Kuiru kun mi	21
Gramatiko - Lingvaj Respondoj (1)	22
Internacia tago de La Gepatra Lingvo	23
Bjalistoka Urbo rifuzis celebri la Zamenhof-jaron	24
Bonan apetiton, sinjoro kuniklo (fabelo)	25
La jarkompaso	25
Esperanto Kurso (14)	26
Fermo	28

Aĉetu ĝin papere ĉe:

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9402>

aŭ ĉe: <https://www.amazon.com/Poezia-Antologio-Poemtraduko-AI->

[Esperanto/dp/1595693297/ref=sr\\_1\\_8?ie=UTF8&qid=1479633135&sr=8-8&keywords=nazim+hikmet](https://www.amazon.com/dp/1595693297/ref=sr_1_8?ie=UTF8&qid=1479633135&sr=8-8&keywords=nazim+hikmet)


## Ni atendas leterojn de geamikojn



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

## Kursoj



- 1) La kurso en la Lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbulu daŭras.
- 2) La kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto ne okazas ĉijare.
- 3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

## Nazim Hikmet: Poezia Antologio

### Serio Oriento-Okcidento, n-ro 51



ISBN 9781595693297

204 paĝoj. Mola bindo

Tradukis: Vasil Kadifeli

**Traduko de poemoj de la plej konataj maldekstra poeto de Turkujo.**

Redaktis: Renato Corsetti, Hirotaka Masaaki (Vastalto) Antaŭparolo de Mark Fettes

Traduko de poemoj de la plej konataj maldekstra poeto de Turkujo: Laŭ iuj li estas mondfama poeto, sed laŭ aliaj li estas nur "poŝtkartpoeto", kaj laŭ aliaj li estas la fama poeto Nazim Hikmet kun siaj amoj kaj amoroj. Tamen tio, kio faris lin "Nazim Hikmet", estas lia eco de genia talento kiel komunisma poeto. '

"Tiu, kiuj ne scias kiel rifuzi, ne povas percepti nian grandan poeton Nazim Hikmet. La komunisto Nazim Hikmet vidis militon, vivis amorojn, restis en malliberejoj, travojaĝis landojn kaj, alvokante aliajn poetojn por detruigi idolojn, provis kaj zorgis, ke li mem ne fariĝu idolo. Liaj verkoj samtempe estis junaj kaj novaj." (**Halil İbrahim Özcan**, Vicprezidanto de la "Internacia PEN Turkujo" kaj estro de la "Komitato de Verkistoj en Malliberejo")

"Nazim Hikmet per siaj verkoj estas la atestanto de luktoj kaj homoj de la 20-a jarcento... Kaj per ĉi tiu libro lia vojaĝo portos lin al Esperantujo, kie liaj poemoj renkontiĝos kun novaj voĉoj kaj pensoj." **Prof. Gündüz Vassaf**

Aĉetu ĝin elektronike ĉe: <http://www.librejo.com/>



## Esperanto-Sumoo



**La 43a Internacia Esperanto-Sumoo** de la 13a ĝis la 27a de novembro 2016

### Resumo de la novembra sumoo 2016

- \* Nombro de la partoprenantoj: 318 el 26 landoj
- \* Perfektaj venkintoj (15 venkoj): 247 el 318 (77,67%)
- \* 4. Kvanto de legitaj paĝoj: pli ol 19 000 paĝoj
- \* Unuan fojon la nombro de la partoprenantoj superis 300!!!! Gratulu nin!

### Komentoj:

1. Rimarkinde Koreio kreskis multege de 33 al 73. Ŝajnas, ke oni konstatas, ke la sumoo estas tre bona rimedo por altigi nivelon de esperantistoj, kiuj devos sukcesigi la UK-on en Seulo.
2. Japanflanke, japanoj ne volis malvenki kontraŭ Koreio, do la nombro kreskis kaj tenis la unuan lokon.
3. Bonŝance el Svislando gelernantoj partoprenis. Dank' al ili la nombro multe superis 300.
4. Bedaŭrinde la nombro de la partoprenantaj landoj malkreskis. Neniu el Afriko, Usono kaj Oceanio partoprenis. En la sumooj en 2017 ni persvadu niajn amikojn en tiuj kontinentoj.
5. Por la novembra sumoo laboris Jitka (Italio), Renato (Serbio), Siva Naga (Barato), Aleksander (Pollando), Ha (Vjetnamio), Arase (Japanio), Jasuo (Japanio) kaj Vasil (Turkio), kaj krome Ella (Koreio) prizorgis koreajn partoprenantoj, kaj Monsano kaj Kitagaŭa (Japanio) prizorgis sian grupon. Prizorgas nian retejon kaj diplomon Krystyna (Pollando). Ni danku al tiuj kunlaborantoj.

**Ĉefprizorganto HORI Jasuo**

## UEA



**Alvoko por labori por la Afrika Oficejo de UEA.**

2016-12-28, Gazetaraj Komunikoj de UEA

La Komitato de UEA akceptis buĝetproponon por 2017, en kiu la buĝeto por la Afrika Oficejo kreskis. Por bone elspezi la disponeblan ...

**Legu pli ĉe:**

**<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Alvoko-por-labori-por-la-Afrika-Oficejo-de-UEA>**

**Volontula Domo por UEA —**

**Bona Ideo!**

Loĝejo por akcepti pli da volontuloj en la Centra Oficejo estas bezonata.

**Legu pli ĉe:**

**<http://uea.org/asocio/volontuladomo>**

**UEA renovigis sian Statuton**

2016-12-16, Gazetaraj Komunikoj de UEA  
Per 7751 ĝis 8348 jesaj voĉoj el la 9054 esprimataj voĉoj, poŝte senditaj al la Centra Oficejo en Roterdamo, la membroj de UEA ...

**Legu pli ĉe:**

**<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016/UEA-renovigis-sian-Statuton>**

**Serĉata: nova redaktoro de "Esperanto"**

2016-12-14, Gazetaraj Komunikoj de UEA  
La nuna redaktoro de Esperanto, Attila Kaszás, finos sian laboron en tiu posteno ĉi-jare. Tial UEA nun invitas kandidatiĝojn ...

**Legu pli ĉe:**

**<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Sercxata-nova-redaktoro-de-Esperanto>**

## TEJO



Kadre de la Eŭropa Volontula Servo, TEJO invitas vin por iĝi

plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. La volontulo laboras en la koro de la Esperanto-movado – la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio kaj TEJO, povas kunlabori pri tre interesaj projektoj, partopreni aranĝojn reprezentante TEJO-n kaj kunlabori en la tutmonda medio.

**Legu pli ĉe:** **<http://tejo.org/tejo-sercas-evs-volontulon-5/>**

Daŭras la TEJO-kampanjo pri la unua IJK en Afriko! Por ke junaj aktivuloj en Afriko povu konstrui pli fortan kaj grandan Esperanto-movadon, ili bezonas renkontiĝi, interŝanĝi spertojn kaj vere senti Esperantujon. Tian eblecon ili bedaŭrinde ne havas pro vizaj problemoj kaj financaj limigoj. Pro tio Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) decidis veni kun sia ĉefa evento al Afriko kaj organizi interkapabligan projekton.

**Detaloj en:**

**<https://www.generosity.com/community-fundraising/ni-realigu-la-unuan-ijk-n-en-afriko/>**

Pasporta Servo bezonas vin! Landaj Organizantoj mankas por kontroli la adresojn kaj kontakti la gastigantojn enlande. Datenoj ankoraŭ ne estas kontrolitaj por kelkaj landoj.

**Detaloj en:**

**<https://pasportaservo.org/lo/>**

JarKompaso estas tutmonda movado, kiu motivigas homojn ordigi sian pasintan jaron kaj plani sian sekvan jaron.

**Elŝutu senpage ĉe:**

**<http://yearcompass.com/eo/>**



## Leterojn ni ricevis el geamikoj



Estimata sinjoro, Mi rete kaj plezure legis vian gazeton "Turka Stelo" kaj gratulas vin pro la kvalito de la artikoloj proponitaj. Samideano via. **Francis Desmares** (Fracujo)



Mi kore dankas pro la nova numero de Turka Stelo. Ankaŭ al vi mi prezentas miajn

bondezirojn por feliĉa kaj precipe sana nova jaro. Ke vi, kaj la Turka Stelo prosperu en 2017! **Fons Doomen** (Nederlando / Turkujo)




Treege interesa estas por mi via revuo, koran dankon pri ĝi. Mi legis nun pli ol unu horo kaj ne komprenis kiel pasis la tempo. Ĉio estas interesa por mi. Ankaŭ la

fabeloj... **Elena Popova** (Bulgarujo)



Estimata.. Mi ricevis kaj tralegis vian bonegan, riĉenhavan, grafike belan kaj varian revuon. Belega! Mi dankegas kaj gratulas! Estis vera plezuro. **Paŭlo Sergio Viana** (Brazilo)

## Morto de la panĝaba lingvo



Karaj geamikoj, jen estas mia eta artikolo pri mia patrina lingvo. Mi ne deziras ĝeni vin ke vi ĉiuj legu ĝin, mi simple metas ĝin por tiuj amikoj kiuj havas intereson en suda azia vivmaniero. Pardonu min.

### Morto de la panĝaba lingvo en Pakistano.

Antaŭ legi ĝin, simple memoru unu aferon ke puŝtunoj (Pathans) en Pakistano, eĉ en Panĝabo ĉiam ili parolas la lingvon Puŝtan inter si, sindhanoj, baloĉanoj kaj eĉ la migrantoj kiuj venis de la hinda unio (el la hinda/urdua lingva regiono, ili faras la samon. Ili parolas siajn patrinajn lingvojn. Nur ni, panĝabanoj (plej parte ni islamaj panĝabanoj, 65% pakistananoj), ne komprenas tiun ĉi tre simplan kaj bazan regulon (manieron) de la pasanta vivo en la mondo. Mi ne scias ke kial ĝi fariĝis tre malfacila por ni kompreni ke kial ĉiuj aliaj homoj paroli sian propran gepatran lingvon ĉiu kampe en ĉiu ajn parto de la mondo.

Kiam du panĝabanoj ne parolos sian gepatran lingvon "panĝaba" al la unu de la alia (reciproke), tiam la panĝaba lingvo mortos. Kiam panĝabaj gepatroj ne

parolos la panĝaban lingvon kun siaj infanoj, tiam la panĝaba lingvo mortos. Kiam panĝaba oficiro ne parolas la panĝaban lingvon kun siaj panĝabaj subuloj, tiam la panĝaba lingvo mortos. Kiam imamo de moskeo ne parolos la la panĝaban lingvon en moskeo, tiam la panĝaba lingvo mortos. Kiam instruisto ne prelegos aŭ diskutos en la panĝaba lingvo en lernejoj kun panĝabaj studentoj, tiam la panĝaba lingvo mortos. Kiam politikaj gvidantoj ne parolos la panĝaban lingvon al siaj masoj vivantaj en la panĝabo, tiam la panĝaba lingvo mortos. Kiam komunikilaj personoj ne parolos la panĝaban lingvon en la regiono de la Punjab, tiam la panĝaba lingvo mortos. Kredu min aŭ ne, estas ĉe vi ke en Pakistano, la panĝaba lingvo estas mortigita de ni ĉiuj. Pensu mem serioze ke vi estas unu el tiuj murdistoj kiuj mortigas la panĝaban lingvon, la lingvo de la regiono Panĝabo (indusa valo), la lingvo de la grandaj spiritaj mentoroj!

Dividu ĝin en via paĝo aŭ parolu pri tiu temo kun viaj amikoj por la realigo se vi havas malgrandan, eĉ etan senton de amo por Panĝabo kaj 150 milionoj panĝabanoj vivantaj en diversaj mondopartoj.

**Saeed Ahmad**

*Necesas regula okazigo de la Afrika Kongreso, dum kiu renoviĝos aŭ konfirmiĝos la konsisto de la Afrika Komisiono de UEA. Tiu kongreso okazu ĉiun trian jaron.*

*Afrika Oficejo (AO) efikas kiel montrofenestro de Esperanto en Afriko; pro tio urĝas modernigi ĝin, por ke ĝi povu kompetente, digne kaj akurate efektiviĝi la bezonojn de Afrikanoj kaj ĝi (AO) plenumu la decidojn kaj planojn de la Afrika Komisiono.*

*Afrikanoj klopodu aktive serĉi novajn eblojn por pruvi la utilon de Esperanto en la ĉiutagaj vivagadoj kaj entuziasmigu la rilatojn inter ili reciproke, kaj kun aliaj.*

*Afriko estas granda kontinento; pro tio necesas dividi ĝin laŭ geopolitika organiza modelo por ebligi la migradon de Esperanto-renkontiĝoj. Esence temas pri Okcidenta, Suda, Orienta kaj Centra Afriko. Ĉiu regiono estu reprezentata kiel eble plej ekvilibre en la Afrika Komisiono.*

*Landaj asocioj kaj kluboj afrikaj strebu al memstareco.*

*Seminario por aktivula maturigo (SPAMO) estas dezirata kaj ĝi povos okazi en iu afrika lando, kie ekzistas forta movado.*

**JoCa, Kotonuo, la kvaran de januaro 2014  
La Kongresanaro**





## Rezolucio de la 6-a Afrika Kongreso de UEA (Bunda, Tanzanio)

De la 24-a ĝis la 31-a de decembro 2016 okazis en Bunda, Tanzanio, la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA en kiu partoprenis 74 geesperantistoj el 14 landoj (Brazilo, Burundo, Togolando, Sudafriko, DR Kongo, Kenjo, Ruando, Zambio Tanzanio, Islando, Francio, Hungario, Japanio kaj Koreio). Dum la kongresa semajno estis pridiskutitaj pri paco, evoluo, vojoj kaj rimedoj por pli vigle vivi Esperanton kaj la movadon en Afriko. La 6-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA akceptas la sekvan rezolucion :

1- UEA firmigu la regularon pri kontinentaj kongresoj, ĝi kreu praktikan gvidilon pri organizado de tiuj eventoj kaj engaĝu sin pli forte en iliaj financoj kaj reprezentaj aspektoj.

2- La 7-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA okazu principe post tri jaroj en lando kaj urbo decidota de la Afrika Komisiono, konsulte kun afrikaj landaj asocioj, la Estraro kaj oficejo de UEA.

3- La Afrika Komisiono studu la eblojn okazigi Afrikan Kongresan Universitaton kadre de la 7- a Afrika Kongreso de UEA.

4- TEJO, UEA kaj Afrika Komisiono kunlaboru por ebligi partoprenon de junaj aktivuloj el diversaj afrikaj landoj en la IJK 2017.

5- Okazu UK en Afriko, kie ĉiam ardas deziro pri tio. Afrika Komisiono konsulte kun afrika landa asocio en kiu regas harmonio pretigu klaran invitproponon al UEA por la periodo ekde 2020. Por tiu Afrika UK, UEA kaj Afrika Komisiono klopodu kapabligi afrikanojn per serio da trejnadaj. La Afrika Kongreso ne estu nur plia kongreso, sed evento por ankaŭ realigi evoluigan projekton en la gastigonta lando.

6- Afrikaj esperantistoj uzu Esperanton por konservi, savi, divolvi la kontinentan kulturon ekzemple per verkado aŭ tradukado de libroj kaj produktado de artaĵoj.

7- Ni kuraĝigu novajn regionajn organizaĵojn kaj renkontiĝojn en Afriko por ke ne ĉiuj devu sekvi nur la aktivaĵojn de la Afrika Komisiono.

8- Lernado estas la bazo de ĉiu disvolviĝo, la lingva nivelo de la Esperanto-parolantoj en Afriko estas altigenda. Okazu regule en la kontinento aktivulaj trejnadaj por flegi la lingvan konon kaj konduton de

afrikanoj. La laboro por Esperanto estas laboro pri mondo pli paca. Afrikaj esperantistoj kapablu kompreni, lerni kaj respekti sin reciproke.

Farita en Bunda, Tanzanio, la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA La kongreso.



## Rezolucio de kvina afrika kongreso de UEA (Cotonou - Benino)

De la 29-a de decembro 2013 ĝis la 04-a de januaro 2014, kunvenante en kulturdomo JoCa en la benina urbo Kotonou, la 32 partoprenantoj de la kvina Afrika Kongreso de Esperanto el 11 landoj volas komuniki al la tutmonda esperantistaro jenon:

Nia Kongreso okazas deksep jarojn post la kvara Afrika Kongreso en Tanzanio. Ĝi povas okazi pro la granda subteno de UEA, de Institucio Hodler kaj de multaj esperantistoj el ĉiuj mondopartoj kaj ni volas elkore danki al ili.

Nia kongreso estas la unua evento en la jubilia jaro "Montevideo 60" (1954-2014) kiu celebras la 60-an jarrevenon de la Unesco rezolucio, kaj devas esti konsiderata tiel.

Ne indas esplori pri la kaŭzoj de la personaj konfliktoj en la movado, akuzi antaŭajn gvidantojn, sed ĉiuj devas rigardi antaŭen kaj agadi.

Havi klubojn en liceoj kaj universitatoj estas bone. Sed al tiu celgrupo oni povas aldoni aliajn sociajn tavolojn, kiuj kapablas finance subteni la movadon kaj partopreni Esperanto-kursojn, kongresojn kaj kunvenojn.

La deziro organizi internaciajn renkontiĝojn por perfektigi lingve kaj spertiĝi movade ekzistas arde en Afriko. Ni anoncas nun nian pretecon labori por la okazigo en Afriko en la jaro 2016 ekzemple de IJK, UK kaj/aŭ ILEI-konferenco.



## La dek plej gravaj okazaĵoj en Esperantujo en 2016

La jaro alvenas al la fino kaj homoj pretiĝas por saluti la novan jaron kiu alvenas. En 2016 multaj okazaĵoj profunde markis la esperantan movadon. Kun bondeziroj por la nova jaro, El Popola Ĉinio invitas vin rememori la plej gravajn okazaĵojn en Esperantujo dum la jaro 2016. Feliĉan novjaron!

### Akademio de Esperanto registrita en Nederlando



La prezidento de la Akademio de Esperanto, Probal Dasgupta, estis en Nederlando fine de septembro por subskribi dokumentojn

necesajn por ke Akademio de Esperanto estu jure agnoskata kiel memstara senprofita organizaĵo. Ekde la fino de la tuta procezo, Akademio de Esperanto povos ricevi subvenciojn de Eŭropa Unio kaj registaraj instancoj.

### Stefan MacGill: Esperantisto de la jaro



La eks-prezidento de ILEI kaj nuna vic-prezidento de UEA, Stefan MacGill, estis elektita kiel Esperantisto de la Jaro 2016, en konkurso iniciatita de La Ondo de Esperanto. MacGill estas agema esperantisto kaj ricevis la

premion pro lanĉo kaj realigo de UEA-programo Aktivula Maturigo (AMO).

### UK unuafoje okazos en Portugalio



UEA anoncis, ke la 103-a Universala Kongreso okazos en Lisbono, ĉefurbo de Portugalio, en 2018. Estos la unua fojo, ke tiu lando gastigos UK-on.

### Sukcese okazis UK en Nitro, Slovakio



La 102-a UK okazis en Nitro, Slovakio. La organizantoj faris bonan laboron kaj sukcesis ne nur prepari buntan programon por la kongresanoj, sed ankaŭ prezenti Esperanton al la ekstera publiko per bone elpensita diskonigado kaj malfermaj aktivaĵoj.

### Forpasis pluraj elstaraj esperantistoj



Esperantujo perdis plurajn el siaj plej eminentaj intelektuloj en 2016. Inter la elstaraj forpasintoj en tiu ĉi jaro estas Reinhard Selten, nobel-premiito pri Ekonomiko en 1994, Detlev Blanke kaj Michel Duc Goninaz,

kiuj elstare kontribuis por esperantologiaj studoj, kaj Paul Gubbins, kies verkaro kaj agadoj multe kontribuis por evoluigo de la esperanta movado.

### Rekorda studsesio en Poznano



La septembra studsesio en la universitato "Adam Mickiewicz", en Poznano, Pollando, estis plena de rekordoj: 17 studentoj de la trijara

studprogramo pri Interlingvistikaj Studoj atingis la trian jaron, kiam okazas specialiĝoj. Tiu rekorda nombro da partoprenantoj ebligis la okazigon de kvar specialiĝoj: pri esperanta lingvistiko, esperanta literaturo, internacia kaj interkultura komunikado kaj instruado de Esperanto. Aliaj 18 studentoj komencis la unujaran instruistan trejnadon.

### Redaktado de revuo Esperanto: kapdoloro por UEA

La estraro de UEA ne renovigis la laborkontrakton de







movado. La nunaj volontuloj helpis enretigi informojn, serĉi subvenciojn, organizi laboron, krei novan datumbazon de UEA, kunmeti kaj kunhavigi informojn pri Esperantaj gazetoj, redakti libron - ĉiuj laŭ siaj emoj kaj intereso. Aliaj taskoj atendas — interalie, organizado kaj enretigo de Biblioteko Hodler, unu el la plej grandaj trezoroj de la Asocio.

havas la plenan kaj entuziasman subtenon de la Estraro. Bonvenas ĉiuj donacoj por tiu celo, ĉu grandaj, ĉu etaj. Ĉiu eŭro estos bone uzata. Koran dankon!

**D-ro Mark Fettes**  
Prezidanto de UEA

La plivastigo de la Volontula Servo estas unu el la prioritatoj de nia nova Ĝenerala Direktoro, kaj en tio ŝi

P.S. Por donaci, bonvolu viziti la retpaĝon:  
<http://uea.org/alighoj/donacoj>

## 16 novaj premiitoj en la PANTEONO



Suzanne BOURROT  
1936 -  
Francujo



Michel DECHY  
1947 -  
Francujo



Roman Dobrzyński  
1937 -  
Pollando



Emilia Guadalupe Vega  
1944 -  
Meksiko



Natalia KASYMOVA  
1955 -  
Rusujo



Jolanta Aldona KIERAS  
1952 -  
Pollando



Aranka LASLO  
1969 -  
Serbujo



Mallely Martínez Mateos  
1977 -  
Meksiko



Fabrizio Angelo Pennacchietti  
1938 -  
Italujo



Nina Pietuchowska  
1950 -  
Pollando



Ariette PLUTNIAK  
1948 -  
Francujo



Edmond PLUTNIAK  
1943 -  
Francujo




Libert PUIG  
1933 -  
Hispanujo



Wei Yubin  
1965 -  
Ĉinujo



Peter WEIDE  
1947 -  
Germanujo



Halina KOMAR  
1937 -  
Pollando

Ni kun ĝojo anoncas al vi ke ankaŭ ĉi-jare, okaze de nia jubilea 15a datreveno, ni premias 16 meritplenajn kolegojn kaj prezentos ilin en nia Panteono.

Tiun geston de honorigo ni jam faras de pluraj jaroj.

Danke al tio kun la ĉi-jaraj

premioj estos 100 vivaj kolegoj kune kun 97 jam forpasintaj gravuloj.

Niaj pensoj kaj koraj gratuloj iru al la festataj. Ni dankas ĉies sindonan laboron kaj deziras al ili longan vivon en sano kaj energio kaj multajn pliajn eblojn por kontribui al nia komuna laboro.

La unuopajn vivresumojn vi povas vidi klakante al la nomoj kaj sub la prezentoj vi povas lasi viajn gratulvortojn kaj memoraĵojn pri la kolegoj.

**Fonto: Edukado.net (12/12/2016)**  
<http://edukado.net/novajhoj?id=665>



## Asociaj membroj ŝanĝis la statuton de UEA



La statutŝanĝoj proponitaj de la estraro de UEA estis aprobitaj en la ĝenerala voĉdonado, kiu finiĝis la 15-an de decembro 2016. Tion anoncis la Centra Oficejo de UEA en gazetara komuniko dissendita baldaŭ post la eŭropa noktomezo. Malpli ol triono el la individuaj membroj voĉdonis.

Laŭ la komuniko la Centra Oficejo ricevis entute 1.336 individuajn voĉdonilojn, 37 voĉdonilojn de la landaj asocioj kaj 5 voĉdonilojn de fakaj asocioj.

En ĝenerala voĉdono ĉiu individua membro havas unu voĉon. Ĉiu aliĝinta faka asocio havas cent voĉojn, kaj ĉiu aliĝinta landa asocio havas nombron de voĉoj egalan al la kvanto de membroj, por kiu ĝi kotizas al UEA. Sekve la 1.378 voĉdoniloj reprezentis entute 9.054 voĉojn.

Laŭ la komuniko de UEA ne multo klaras pri tio, kiel la voĉoj dividiĝis. Ne estas aparte raportite, kiel voĉdonis la individuaj membroj kaj la asociaj membroj. Eĉ ne klaras, kiom da voĉoj fakte estis donitaj por kaj kontraŭ la diversaj proponataj statutŝanĝoj.

La statutŝanĝo laŭ la komuniko de UEA estis aprobita per "7.751 ĝis 8.348 jesaj voĉoj el la 9 054 esprimitaj voĉoj, poŝte senditaj al la Centra Oficejo en Roterdamo". Do la plej populara statutŝanĝo ricevis 597 voĉojn pli ol la plej malpopulara, sed mankas informo pri tio, kiu el la proponoj fakte ricevis malplej da subteno, kaj ĉu la subteno venis unuavice de la individuaj aŭ de la asociaj membroj.

Kredeble malplej multajn voĉojn tamen ricevis la plej drasta el la ŝanĝoj – la transformo de TEJO el "integra parto" de UEA al "jure memstara asocio, al kiu UEA konfidas la organizadon de siaj junaj membroj." Pri tiu ero la komuniko de UEA aparte mencias, ke ĝi "vekis plej multe da diskuto" – sed mankas informo pri tio, ĉu ĝin subtenis majoritato de la voĉdonintaj individuaj membroj.

Ĝenerale estas mirinde, ke UEA eĉ raportante pri la rezulto de sia propra ĝenerala voĉdonado zorge evitas menci la nombron de individuaj membroj. Estas menciite nur, ke alvenis 1.336 individuaj voĉdoniloj. Laŭ la informoj de Libera Folio UEA nun havas 4.264 individuajn membrojn, do voĉdonis nur 31 procentoj el ili.

Por ŝanĝi la statuton de UEA estas bezonataj du trionoj de la esprimitaj voĉoj. Tiuj du trionoj devas reprezenti minimume duonon de la eblaj voĉoj. Do evidente la sorton de la statutŝanĝoj decidis ne la individuaj membroj – kies majoritato entute ne voĉdonis – sed la grandaj asociaj membroj.

**Fonto: Libera Folio (26/12/2016)**

<http://www.liberafolio.org/2016/12/16/asociaj-membroj-sangis-la-statuton-de-uea/>

## La nova Pasporta Servo Adreslibro jam pretas!



Oni jam antaŭmendas la novan adreslibron !

Administranto Stela kun ĉefprogramisto Baptiste (malantaŭ la fotilo) estis en Roterdamo por preparoli la tempolinion kaj teĥnikajn detalojn pri la eldonado de Pasporta Servo 2017! Kiu pretas jam nun antaŭmendi la libreton?

Fonto:

[https://www.facebook.com/pasportaservo/?hc\\_ref=NEWSFEED&fref=nf](https://www.facebook.com/pasportaservo/?hc_ref=NEWSFEED&fref=nf)





Antaŭ tre tre longe, ĉe la piedoj de la Anda montaro, troviĝis eta vilaĝo, kie loĝis diligenta knabino. Ŝia nomo estis Anda, kaj ŝi estis paŝtistino. Ĉiutage Anda vekigis frue kaj kondukis la lamojn de la vilaĝo al paŝtejo. Ŝi scipovis

melki ilin kaj purigi ilin. Kiam unu el la lamoj vundiĝis aŭ malsaniĝis, Anda flegis ĝin kaj kuracis ĝin pere de folioj, semoj, fruktoj aŭ radikoj. Tiujn kuracrimedojn instruis al ŝi la potenca sorĉistino Kvinoo, la Patrino-de-Ĉiuj-Grenoj, kiu loĝis en malproksima kavo, tre alte en la montaro.

Foje, dum plenluna nokto, Granda Vesperto eniris la vilaĝon. Tiu estis malica sorĉisto, kiu aliformiĝis en vespertegon por ŝteli manĝaĵon. Senbrue, li prenis sakojn da legomoj kaj grenoj, metis ilin sur la dorson de du lamoj kaj malaperis kune kun la ŝarĝitaj bestoj. Ekde tiam li komencis viziti la vilaĝon ĉiun plenlunan nokton por ŝteli. Ĉiufoje li endormigis la vilaĝanojn, tiel ke ili ne kapablis forpeli lin. Oni preparis dekojn da kaptiloj por kapti lin, sed li superruzis ĉiujn per siaj sorĉoj.

La vilaĝanoj fariĝis pli kaj pli malkontentaj. Anda estis la plej ĉagrenita el ĉiuj, ĉar ŝi amis la lamojn kaj timis

pri ilia sorto. Fin-fine, Anda prenis la lamojn de la vilaĝo en la montaron. Tri tagojn ŝi paŝis kun la lamoj tra kaŝitaj sekretaj padoj, ĝis ŝi alvenis al la kavo de Kvinoo.

La saĝa kaj potenca Patrino-de-Ĉiuj-Grenoj manĝigis la lamojn kaj la knabinon, aŭskultante atente ties ĉi plendojn. Dum la nokto, Anda kaj la lamoj dormis, sed la sorĉistino laboris diligente.

La sekvan matenon, Kvinoo ŝarĝis la lamojn per sako da mirakla greno, kiun ŝi ĵus preparis. Anda revenis hejmen kune kun la ŝarĝitaj lamoj.

Tio okazis ĝuste dum la sezono de grenosemado, kaj la vilaĝanoj tuj eksemis la novan grenon. La Granda Vesperto daŭrigis siajn vizitojn kaj ŝtelojn sensuspekteme, ankoraŭ kelkajn monatojn. Dume, la mirakla greno donis tre rapidan rikolton kaj la vilaĝanoj komencis prepari kaĉon el ĝi. Tiu manĝaĵo igis ilin ĉiutage pli fortaj. Iun nokton, la Granda Vesperto venis por ŝteli kiel kutime, sed la vilaĝanoj fin-fine sukcesis kontraŭstari liajn sorĉojn kaj forpeli lin. Pro timo, li fariĝis pli kaj pli malgranda kaj kaŝis sin. Laŭ onidiroj, li perdis por ĉiam la kapablon sorĉi, forfuĝis el la vilaĝo kaj neniam revenis.

La miraklan grenon, la vilaĝanoj nomis "kvinoo", laŭ la nomo de la Patrino-de-Ĉiuj-Grenoj. Ĉu vi konas ĝin? Ĉu vi ŝatas ĝin?

**Fonto: Juna Amiko februaro 2014 – n-ro 3-2013 (138)**

## Okaze de la Libro Tago en la 15-a de decembro ILEI anoncis komunan legadon



En Pollando estas la kutimo (mi eksciis pri tio per raportoj de esperantistoj), ke la tuta popolo en certa preciza tago legas la saman tekston. Tio donas ian

komunan senton, kiu estas laŭ mi pozitiva. Tiu kutimo koncernas la tutan polan popolon. Kial ni ne faru la samon en la tuta Movado?

En nia Movado estas jam diversaj kutimoj kaj agadoj por sugestoj, rekomendi legadon al niaj membroj. La Esperanto-Sumoo, kiun ILEI aŭspicias, lanĉita de nia japana kolego HORI Jasuo, estas bona ekzemplo. La 15-a de decembro estas la Tago de la Libro. Do tiam

ni aĉetu librojn, kaj pli bone legi ilin ol lasi ilin sub polvo sur breto.

Kadre de la Jaro de la Lernanto ILEI lanĉas novan agadon: Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro. Ni ĉiuj legu en tiu Tago la saman tekston. Ne povas esti kompleta libro, ĉar horoj mankas por tia legado. La teksto mem aperos en diversaj mesaĝoj kaj retpaĝoj, ĉar ne ĉiuj povas iri al Esperanto-biblioteko por trovi la libron.

En 2016 venas poemo de Tibor SEKELJ. Pri tiu grava verkisto de nia kulturo, kiu cetere ankaŭ verkis en aliaj lingvoj, vi povas trovi informojn pri lia vivo kaj verkaro uzante [www.eo.wikipedia.org](http://www.eo.wikipedia.org). La poemo de nia unua jaro 2016 nomiĝas "Je kies nomo?" kaj ĝi rilatas al la



nuna monda situacio militoplena. Viaj demandoj, komentoj kaj rimarkoj pri tiu teksto povos veni en pria paĝo en Facebook.

<https://www.facebook.com/ILEI-Komuna-Legado-okaze-de-la-Tago-de-la-Libro-1791351147787608/?fref=ts>

Bonvole printu ĝin kaj provu legi ĝin dum la Tago 15-a de decembro, plurfoje, se eblas laŭte, se eblas kun aliaj esperantistoj. Povus esti diskuttemo okaze de kunveno aŭ kluba vespero.

Ni deziras al vi riĉan pripenson kaj helpan paŝon en la kompreno de nia mondo.

**elkore salutas  
Mireille Grosjean  
prez. de ILEI**

## **Je kies nomo el «Kolektanto de ĉielarkoj»**

Reĝido sub arbo sidis  
Longajn jarojn.  
Subite li klare vidis  
Darmon kaj karmon.  
« Faru bonon. Regu modero.  
Via reenkarniĝo pli fora, pli glora. »  
Li deklaris je l'onomo del vero,  
la sola vero sur tero.

Tra liaj vortoj la homoj sentis  
La veron. Ili obeis.  
Ili ne plu oferis. Sin ne turmentis,  
feliĉaj ili vivis  
je l'onomo de l'vero...  
ne plu en mallumo drivis.

Barbulo grimpis monton  
Dek literojn li ĉizis en ŝtonon.  
Revene li proklamis je nomo dia :  
« Ĉesu murdado plia,  
ŝtelado ĉesu, ne plu kokru,  
aliajn diojn ne adoru ! »

La homoj akceptis la diajn admonojn :  
detruis idolojn, ne plu murdis homojn,  
fidelis al siaj edzinoj senvorte,  
ĝismorte.

El trogo leviĝis senhelpa infano  
kun mano malforta, buŝo malmultvorta,  
en la mondon li ekiris.

« Amu kiel vin mem, vian najbaron »,  
je l'onomo de sia patro, dio, li diris  
kaj « post vangofrapo montru la alian vangon.»

La homoj lin kredis, en amo lin sekvis  
kaj montris la vangon eĉ sen antaŭa frapo.

Kamelgardisto vagadis tra dezertoj  
Meditis longe, kolektis spertojn  
Kaj eldiris leĝojn je dia nomo,  
Kiujn devas ĉiu homo obei :  
« morton al ĉiuj kiuj kuraĝas nei ! »  
Kaj ekmoviĝis sankta milito  
kun arda fervoro kaj obstina spito  
por venki aŭ pere !


Ankaŭ mi grimpis monton kaj sub arbo sidis  
kuŝis en trogo, perditajn gvidis,  
meditis en dezerto pri akiritaj spertoj.

Kien ajn mi iras, mi diras :  
« vivu en paco, ne plu militu.  
Panon disdonu, ne plu ŝetu bombojn,  
Bomboj kreas mizeron, dum dolĉas la pano !  
Homoj... estu homoj ! »

Mi krias kaj petas, ĝisraŭke ripetas,  
Senrezulte : ili plue bombojn ŝetas  
Urbojn detruas, animojn skuas.  
Por peco da pano skeletoj vicostaras  
Kaj kie ĝi abundas, pano amaras.  
...Ĉar finfine... je kies nomo mi krias  
naivulo romantika ?

Eĉ mi mem ne scias !

**Tibor Sekelj 28.12.1987**





## Ŝercoj



En frenezejo la malsanuloj deziras flatadi al la ĵus alveninta kuracisto.  
-Sinjoro doktoro, ĉu vi scias, ni pli bone ŝatas vin ol vian antaŭulon.  
La kuracisto ĝoje:

-Ĉu vere? Kial?

-Ĉar vi tre similas al ni.

-----  
Manĝi gujavon

Viro paŝadas surstrate, kaj ekvidas frenezulon, kiu surgrimpis foston, kaj demandas:

- Kion vi faras tie supre?

- Mi manĝos gujavon! – respondas la frenezulo.

Kaj la viro argumentas:

- Sed tio ne estas gujavujo; ĝi estas fosto!

- Kio do? La gujavon mi tenas en mia poŝo, kaj mi manĝos ĝin, kie mi volas!!

-----  
Kiu estras?

Departamentestro, tre antipatia, konkludas, ke liaj subuloj ne tre respektas lian gvidadon, kaj decidas meti la jenan afiŝon sur la pordon de sia laborĉambro, tuj kiam li alvenis matene: "Ĉi tie la ĉefo estas MI!"

Reveninte de kunsido, li trovas la jenan bileton sur la afiŝo: "Via edzino telefonis kaj diris, ke vi devas reporti hejmen ŝian afiŝon."

-----  
Interreta babilejo:

- Amiko, kial vi malaperis tiom da tempo?

- Ne demandu! Lu atakis min, deprenis mian tutan monon kaj poste eĉ seksperfortis min.

- Ĉu vi memoras kiu estis tiu?

- Certe, kiel mi povas forgesi mian edzinon!



Kien vi kondukas la bovon?

Bovino ŝi estas.

Mi parolas al ŝi!



## Kruĉvort-enigmo

### Horizontale

1. La speciala rilato kun iu aŭ io, aparte tuŝanta, interesanta iun aŭ ion; Numeralo esprimanta la nombron post 0 en la serio

de la entjeroj.

2. Muzika teatraĵo, konsistanta el recitativoj, kantoj akompanataj de orkestro kaj kelkafoje baletoj; Kalia salo de tetrabromfluoresceino, C<sub>20</sub>H<sub>2</sub>Br<sub>4</sub>K<sub>2</sub>O<sub>5</sub>, ruĝa substanco tre koloriga, uzata en fotografio, histologio kaj denta medicino.

3. Tiu elstara part' de la brusto ĉe hominoj kaj simiinoj aŭ de la ventro ĉe la ceteraj mamulinoj, kiu entenas la laktoglandojn; Kostant' multan monon; Streĉa interplektaĵo, per kiu interligiĝas du fadenoj, ŝnuroj ks, aŭ simpla plektaĵo de nur unu fadeno aŭ ŝnuro, streĉita ĉirkaŭ si.

4. Dekreto de la rusa caro aŭ de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR; Mallongigo de deoksiribonuklea acido; Prepozicio montranta la limigitan spacon aŭ la objekton, de kies interno io sin movas eksteren.

5. Konforma al denaska ecaro de estulo aŭ aĵo, kontraste kun artefariteco, kulturo, civilizo aŭ kun afekto aŭ komplikeco; Adverba formo de sufikso esprimanta pasivon dum plenumiĝo de procezo.

6. Granda komerc-urbo.

7. Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj; Konsistanta el pli-malpli pura metalo kun atomnumero 79.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												



8. Aldona; Ĉefurbo de Kartvelio.
9. Oreldoloro; Surfaca amplekso.
10. La 21a grafemo de la Esperanta alfabeto; Sufikso esprimanta pasivon kaj uzata por persono aŭ objekto, kiun oni submetis al iu procezo.

## Vertikale

1. Rilata al pluraj samtempe; Prepozicio esprimanta ĝenerale la celon kaj pli precize montranta tion, al kio estas destinita aŭ adaptita io aŭ iu.
2. Maldiafana, ne tralasanta la lumon; Vertikala dimensio en la suprenira direkto.
3. Ne estanta materio, ne entenanta materion.
4. Kemia simbolo de elemento kun atomnumero 24; Aŭdig' kontinuan, malakutan kaj obtuzan bruon (verbo); Ĉiu el la du flankaj partoj de la nazo.
5. La materia parto de homo kontraste kun la spirita;
6. Edzino de Krono; Inflam' de la aortaj tunikoj.
7. Tiu part' de la horizonto, kiu kuŝas dekstre de observanto, staranta sur la ekvatoro kaj rigardanta la subirantan sunon; Ago de perforta aŭ minaca forpreno ies posedaĵon.
8. Sufikso uzata, por formi nomon de malsano.
9. Havanta la sekson de ino; Longa, mallarĝa kaj maldika pec' de ligno, uzata en konstruado, speciale kiel subtenilo de gipso aŭ kiel materialo por ĵaluzioj, malpezaj bariloj ks.
10. Unuiĝintaj Nacioj; Fruktu, bereca ŝajndrupa dolĉa, sukplena, karneca, longforma, alpedunkle mallarĝiganta, manĝata kruda aŭ kuirita, uzata i.a. por konfitaĵoj kaj suko.
11. Eta anatomia aŭ patologia nodo; Subjunkcio, signifanta «en la okazo, kiam», «kun la supozo, ke», «sub la kondiĉo, ke» kaj montranta rilaton inter fakte okazinta aŭ okazanta ago kaj ĝia sekvo.
12. Grasa likv' de origino vegetaĵa, animala aŭ minerala uzata por nutrado, medicino, lumigado, arto, industrio kaj religiaj ceremonioj; Japana simbolisma dramo aristokrata, naskiĝinta en la 14a jc.

\* La solvo de la kruĉvort-enigma troviĝas en la lasta paĝo de ĉi tiu revueto.

## Alvoko por labori por la Afrika Oficejo de UEA



La Komitato de UEA akceptis buĝetproponon por 2017, en kiu la buĝeto por la Afrika Oficejo kreskis. Por bone elspezi la disponeblan sumon, UEA lanĉas malferman alvokon por tiuj esperantistoj loĝantaj en Afriko, kiuj interesiĝas

plenumi parton aŭ ĉiujn el la sube menciitaj taskoj.

La taskoj de la Afrika(j) Oficejo(j) estos laŭplane:

### 1. Konsciigo

- \* respondi informpetojn
- \* informi tie, kie ne jam estas movado, rezulte Esperanto-komunumo aperu en novaj landoj, en aliaj landoj la informado celu plifortigon de la movado
- \* krei kaj renovigi retpaĝojn de Landaj Asocioj
- \* prizorgi rilatojn kun instancoj

### 2. Kapabligo

- \* instrui koresponde al progresantoj

- \* kapabligi rilate al gvidado, mastrumado, ĝeneralaj lertoj bezonataj por aktivuloj
- \* instigi al trapaso de lingvaj ekzamenoj, kaj laŭeble organizado de sesioj
- \* instigi al kapabligo en instruado de Esperanto

### 3. Komunumo

- \* eldon(ig)i verkojn de afrikanoj
- \* aperigi daŭre la bultenon de la Afrika Komisiono
- \* prizorgi sociajn retejojn

### 4. Kunordigo

- \* zorgi pri transpagoj inter afrikaj landoj kaj la CO
- \* konsiladi al Landaj Asocioj en Afriko
- \* plifortigi la Landajn Asociojn, kie jam estas movado
- \* subvencipetado al ne-Esperantaj instancoj
- \* Aldone povas aperi pliaj taskoj. Sukcesa plenumo signifas ankaŭ regulan, ĉiusemajnan raporton pri la plenumo de la akceptitaj taskoj.

(daŭrigota en la lasta paĝo)





En la novembra numero de nia revueto ni prezentis al vi nian novan legantinon **Elena Popova** kiu estas verkistino kaj loĝas en Bulgarujo. Ni dankas ŝin por la permeso prezenti al vi kelkaj el ŝiaj hajkoj. Ĉi foje ni prezentas al vi ŝiaj hajkoj pri sezono "**Aŭtuno**" el ŝia libro "**La sezonoj de la animo**".

**Hajko** estas tradicia japana lirika poezio, ekzota floro en la kampo de la arta kulturo, kiu malfacile kreskas en aliaj landoj. Ĝi estas produkto de alia mondrigardo kaj defio por la artisto. Kontraste la malavara poezia esprimo en la okcidento, la japanaj poetoj kapablas nur en tri mallongaj linioj de 5-7-5 silaboj kapti la momenton kaj transdoni sentojn.

*Kaŝtan' en floro –  
espero dum oktobro.  
La vento ridas.*

\*\*\*

*Aŭtuno venis.  
La veter' malboniĝis –  
siringoj floras.*

\*\*\*

*Aŭtuna ĝojo.  
Maturaj cidonioj.  
Memor' pri vilaĝ'.*

*Birda konsilo.  
Pretiĝo por fora voj'.  
Kod' aŭ saĝeco ?*

\*\*\*

*Pejzaĝ' unika –  
koloriĉec' sur la ter'.  
Aŭtuna spiro.*

\*\*\*

*Mia animo –  
seka flor' forgesita.  
Senfina tempo.*

*Aŭtun' ekiris.  
Soleco. Tim' en la kor' –  
la vintro venas.*

\*\*\*

*Aŭtuna floro –  
promesita beleco.  
Lasta donaco.*

\*\*\*

*Estis septembro.  
Kaj ree. Vana attend'  
la trajn' trapasis.*

## Stela Ŝalo



Dum mirinda blanka nokto, inter rido kaj neĝa blovado, Februaro ornamis la teron per ŝalo el steloj, por ke ĝi ekbrilu. La ĉielaj steloj gaje ekmuzikis por siaj teraj neĝaj kunfratinoj.

Sed matene raŭpaj aŭtoj tretis la stelan ŝalon, ŝuoj surpaŝis ĝin, fulgeroj de kamentuboj ĝin ekfumis kaj

## Rakonteto de Elena Popova

nigrigis.

Februaro kolere freneziĝis:

- Kie estas la blanka ŝalo? Belaj estis la tero, la tegmentoj, la nudaj arboj. Gajis la infanoj...

Ĝi klinis la kapon al la tero kaj triste ekploris. Sed ĝi estas saĝa – forpelis la tristecon kaj rapide remetis la blankajn ŝalojn.

Poste ĝi ekĝojis kaj ekfajfis kontente:

- Fiuu!...Vi memoru min blanka!...Kaj ne timu de mi!...

Kiu timas la plej mallongan monaton de la jaro?

**Sendis Elena Popova El Bulgario**

## LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2016

1

### La Ondo de Esperanto

Ĉi tiu estas revuo pri Esperanto kaj la mondo ĝenerale. Eldonita de Sezono, kiu ankaŭ eldonas librojn, ĝi enhavas artikolojn pri libroj, mondnovaĵoj kaj renkontiĝoj. Ĝi fondiĝis en Kaliningrado, Rusio, en 1991 kun la sama nomo kiel revuo de 1909-1917. Ĝi disdonas la premio de „Esperantisto de la Jaro“. Aperas monate kun 25 paĝojn. Mi hazarde aperis sur la kovrilo de ĝi ĉi-jare (mi ne scias kial).

Do jen la ĉefaj esperantaj gazetoj kaj revuoj, almenaŭ laŭ mi. Mi nur skribis pri paperaj revuoj, eble mi skribos alian blogeron pri blogoj kaj e-jurnaloj. Mia plej ŝatataj revuoj estas Monato kaj Kontakto, sed Revuo Esperanto ankaŭ estas bona. Beletra Almanako kaj Scienca Revuo aldonas la plej multon al la kulturo kaj prestiĝo de nia lingvo kaj pro tio mi fieras.

**Fonto:**

<https://teokajlibroj.wordpress.com/2016/10/07/cu-vi-volas-legi-esperantajojn-jen-la-cefaj-revuoj/>





## Kiuj estas la ĉefaj revuoj de Esperantujo

### Ĉu vi volas legi Esperantaĵojn? Jen la ĉefaj revuoj!

La plej bona maniero oni povas uzi kaj lerni Esperanton, estas per legado de revuoj. Esperantujo havas multajn gazetojn pri multaj temoj, do certe iun interesos vin. Ekzistas centoj da gazetoj, do mi ne povas preparoli ĉiujn, nur la plej grandaj kaj legindaj. Vikipedio havas grandan liston ke oni povas kontroli. Multaj landoj havas sian nacian gazeton, sed mi nur diskutos la internaciajn periodaĵojn. Mi ne skribas la abonkostojn ĉar tiuj dependas laŭ lando, malriĉaj landoj havas malaltajn prezojn ktp.



### Juna Amiko

Se oni estas komencanto, mi rekomendas „Juna Amiko“ al vi. Ĝi taŭgas por adoleskantoj kaj komencantoj, do estas skribita per facila Esperanto. La revuo nur uzas la 1500 plej bazajn vortojn. Ĝi enhavas dialogojn, rakontojn, bildstriojn, kantojn kaj ludojn. Ĝi estas eldonata de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kvarfoje jare ekde 1972. Ĉiu numero inter 1972 kaj 2013 estas elŝutebla de ĉi tie. Ĝi estas eldonata en Slovakio kaj enhavas 40 paĝojn.

### Revuo Esperanto

La plej malnova kaj oficiala revuo en Esperantujo, estas la Revuo Esperanto (ofte simple nomata Esperanto). Fondiĝis en 1905 kaj daŭrante ĝis hodiaŭ (krom dum la du mondmilitoj), ĝi estas la oficiala revuo de la UEA. Ĝi nur diskutas movadajn aferojn, la agadon de UEA kaj la lingvon mem. La artikoloj ĉefe temas pri renkontiĝoj, naciaj asocioj, aktivismo, kampanioj, intervjuoj kun Esperantistoj, paroladoj, libroj kaj Esperantistoj kiuj forpasis. Ĝi aperas 11 foje jare kaj enhavas 22 paĝojn.



### Revuo Kontakto

La oficiala revuo de TEJO estas Kontakto, kiun strebas esti la plej mojosa revuo. Ĉiuj membroj de TEJO ricevas ĝin senpage. Male al Revuo Esperanto, ĝi malmulte diskutas movadajn aferojn (nur iomete pri TEJO), anstataŭ



temas pri junulaj aferoj. Ĝenerale enhavas artikolojn, intervjuojn kaj eseojn sed de junula vidpunkto. Ĝi ofte havas artikolojn je facila lingva nivelo taŭga por komencantoj. Aperas 6 foje jare kaj enhavas 22 paĝojn ekde 1963.





### Monato

Monato estas „internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo“. . . Monato havas 126 korespondantojn kun kunlaborkontrakto en 43 landoj kaj abonantojn en 68 landoj”. Ĝenerale nur loĝantoj de la lando povas skribi pri la lando. Krome al aliaj revuoj, Monato estas nur „per Esperanto, ne pri Esperanto“. Ĝi neniam diskutas nek esperantaĵojn nek movadaĵojn, anstataŭ temas pri mondaj aferoj. Mi skribis artikolon kiun aperis en la pasinta numero (mi tre fieras). Oni povas legi malnovajn numerojn ĉi tie. Fondita en 1980, ĝi havas 27 paĝojn kaj aperas 11 foje.

### Beletra Almanako

Ĉi tiu estas internacia literatura revuo. Temas pri poezio, prozo, eseoj, kaj originale kaj traduke. Ĝi aldonas multon al la kulturo de Esperanto kaj montras la interesaĵojn kaj belaĵojn oni povas krei per la lingvo. Fondita en 2007, ĝi aperas trifoje kaj havas cxirkaŭ 150 paĝojn



### Scienca Revuo

La Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) eldonas ĉi tiun revuon pri scienaj aferoj. Ĝi aperas ekde 1949 kaj estas daŭrigo de Internacia Scienca Revuo fondita en 1904. Ĝi estas tre grava por la prestiĝo de Esperanto kaj montras ke la lingvo kapablas diskuti teknikaĵon. Ĝi montras ke homoj ne nur uzas Esperanton por preparoli Esperanton, sed ankaŭ seriozaj aferoj. La tuta arkivo estas elŝutebla senpage de la retejo. Oni ankaŭ povas vidi artikolojn antaŭ ili aperas en la revuo, ĉi tie.





## KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS (1)

Komentoj pri la Manifesto de la movado por la internacia lingvo.

Publikigita de UEA, Rotterdam 1999

### Enkonduko

**Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto,**

- **direktas** ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizaĵoj, kaj homoj de bona volo,
- **deklaras** nian intencon firmvole plu labori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj
- **invitas** ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan nuancoriĉan lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvoinstruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

EN LA 81-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en Prago en 1996 estis lanĉita la Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto, pli fama kiel Manifesto de Prago. Ĝi prezentas koncize kaj dinamike, eĉ bataleme, la ĉefajn celojn, por kiuj ni aktivis. Ĝi direktas sin eksteren: al politikistoj, ĵurnalistoj, internaciaj organizaĵoj kaj instancoj, kaj al ĉiuj "homoj de bona volo".

En Prago 700 kongresanoj aliĝis al la Manifesto per sia subskribo. La tiama nomkolektado estis iom hasta kaj spontanea, kaj multaj maltrafis la okazon. Sekve oni daŭrigis ĝin post la UK - kaj ĝi fariĝis la plej granda referendumo en la Esperanto-komunumo: fine de 1998 sub la Manifesto staris 12 500 nomoj.



La celo de la kolektado ne estis imponi nombre, sed konigi la Manifeston inter esperantistoj mem.

Efektive, en plej diversaj

Esperanto-aranĝoj tra la mondo, en kluboj kaj en kursoj oni prelegis kaj diskutis pri ĝi. Tiel disvolviĝis eduka projekto, kiu brile kontribuas al la celo de

Kampanjo 2000 plialtigi la idean nivelon de nia movado.

Por ke tiu projekto daŭru kaj kresku, ni proponas jenajn artikolojn, kiuj pli funde prilumas la Manifestan septezon. Mi esperas, ke ili instigos pluajn diskutojn en grupoj kaj gazetoj, kaj ke ankaŭ individua leganto profitos de ili.

Osmo Buller


### 1 Demokratio

FRANK STOCKER - Politik-sciencisto

**Komunika sistemo kiu tutvive privilegias iujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado. Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.**

DEMOKRATIO: verŝajne ne ekzistas alia nocio, kiu trovas tiel senliman subtenon kiel tiu ĉi. Ĉu nuntempe imageblas homo, kiu nomas sin mem "nedemokrato" aŭ "kontraŭdemokrato"? Demokratio agnoskas, ke homoj estas denaske liberaj. Demokratio jure garantias, ke ĉiu homo povas praktiki siajn rajtojn kadre de konstitucio kaj leĝoj. Demokratio devas helpi, por ke ĉiu homo ankaŭ havu la socian bazon por praktikado de siaj rajtoj. Tio estas la plej profunda signifo de demokratio.

Kion tio signifas por lingva politiko?



Demokrato agnoskas, ke ĉiu homo rajtas paroli kiel ajn li volas: ĉu dialekte, ĉu fremdlingve, ĉu laŭ la literatura maniero, ĉu balbute, ĉu laŭte, ĉu longe, ĉu laŭ mem inventita maniero. Estas la afero de ĉiu homo mem, kiun lingvon li uzas.

Artikolo 2, alineo 1, de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de la 10-a de decembro 1948 tekstas: "*Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ*



socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato."

Tiun tekston akceptis ĉiuj membroj de UN. Laŭsignife la saman enhavon havas ankaŭ la Eŭropa Konvencio por la Protektado de Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj de la 4-a de novembro 1950 (art. 14) kaj la Internacia Interligo pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj de la 16-a de decembro 1966 (art. 2).

Tiel la subskribintoj akceptis, ke neniu devas esti diskriminaciata pro uzado de iu specifa lingvo. Se vi volas, vi povas paroli iun ajn lingvon - la Deklaracio donas al vi la garantion, ke neniu punos vin pro tio. Sed: la Deklaracio neniel donas garantion, ke unuopulo aŭ pli grandaj grupoj, nome lingvaj malplimulto, atingos siajn celojn per tiu lingvo! La artikolo nur postulas, ke neniu estu diskriminaciata pro sia lingvo, ke ĉiu estu egale traktata. Sed se vi lingve ne estas egala al la aliaj, se vi ne povas gajni antaŭ tribunalo, ĉar vi ne parolas la tribunalan lingvon - tio estas via problemo. Vi ja tamen havas la egalajn rajtojn.

Sed demokratio ja bezonas ne nur egalecon. Ĝi estas iom pli. Demokratio postulas la aktivan subtenon de egaleco. Kaj tion jam rimarkis ankaŭ la ŝtatestroj. Pro tio en la Internacia Interligo pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj de la 16-a de decembro 1966 unuafoje aperas la specialaj rajtoj por malplimulto. Ili devas havi interalie la rajton flegi siajn kulturajn kaj lingvajn.

Tute novan epokon komencis tamen nur la Dokumento de la Kopenhaga renkontiĝo de la Konferenco pri la Homaj Dimensioj\* de KSKE (Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo) de la 29-a de junio 1990. En ĝi unuafoje estas eksplicite formulitaj precizaj postuloj pri aktiva, subtena politiko favore al malplimulto. En ĝi aperas interalie la frazo ke la "partoprenantaj ŝtatoj strebos [...] garantii, kie tio eblas kaj necesas, la uzadon de la gepatra lingvo en la oficejoj."



\* homaj dimensioj: kadra termino de KSKE por homaj rajtoj kaj sociala bonfarto

Kompreneble la formulo "kie tio eblas kaj necesas" estas iom vasta. Tiamaniere oni volis eviti, ke ekzemple enmigrintoj povu postuli ke oni uzu ilian lingvon ĉe la administrado de la nova hejmlando. Sed krom tiu ioma limigo la artikolo donas tute klaran gvidlinion: demokrata principo postulas, ke ĉiu ano de malplimulto havu la rajton uzi sian gepatran lingvon ĉe la administrantoj.

En okcidenta Eŭropo momente kreiĝas nova ŝtato, kiu estas vera defio al la demokrata principo en lingvopolitiko. Temas pri Eŭropa Unio. Ĉu eblas en EU reteni la demokratian principon, ke ĉiu rajtas uzi sian gepatran lingvon? Kompreneble ĉiu el la 11 naciaj lingvoj estas jure samranga ene de EU. Jure regas absoluta egaleco. Sed kio pri la frateco, kio pri la aktiva subteno por realigo de la fakta egaleco?

Multo jam nun indikas, ke tiurilate la afero fiaskos. Ene de la administradaj instancoj de EU regas preskaŭ senescepte la franca kaj la angla. Kiu volas havi bone pagatan laboron ĉe EU aŭ bone pagatan mendon por sia entrepreno, nepre devas uzi unu el la du lingvoj. Kiu volas stipendion por la universitata kariero, petu ĝin en la angla. Kaj tiel plu. La respondeculoj de EU defendas sin atentigante pri la Traktato, kiu garantias egalajn rajtojn. Kaj tiu argumento eĉ estas prava. Pro tio multaj jam silentas post tiu argumento. Sed la grava afero estas, ke demokratio postulas ne nur juran egalecon, sed same aktivan strebon al la fakta egaleco.

Kaj jen estas la granda manko en la lingva politiko de EU.

Kiel ni vidas, la sistemoj ĉi-supre priskribitaj, malgraŭ la bonaj intencoj, ankoraŭ "privilegias iujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo". Ili, do, "estas fundamente maldemokratiaj".



"Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia."

Frapfrazo de la Unua Libro, 1887

Evidente nur sistemo kiu baziĝas sur sama kvanto da peno por atingi saman komunik-kapablon, povas garantii demokration. Tiu sistemo povas esti starigata nur surbaze de neŭtrala lingvo, kiu ne estante la lingvo de unu el la komunikantaj grupoj, metas ĉiujn en la samajn kondiĉojn.

Esperanto estas ĝuste tio.

(daŭrigota)



## Mallonga Historio de Filozofio (13)



**Saluton,**

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun Blaise Pascal (Paskalo).

**Vasil Kadifeli**

### Ni vidu la vetojn! Blaise Pascal (Paskalo)



Kiam vi ĵetas moneron la probableco de havi la fronton aŭ la dorson estas tute egala, do ne gravas sur kiun flankon vi vetas. Sed se vi ne certas, ke Dio ekzistas, ĉu vi povas veti sur tio? La rezulto povas esti malagraba. Do, ĉu vi

daŭrus vian vivon tiel, kiel Dio ne ekzistas aŭ ĉu vi pretendus vivi taŭgan vivon kvankam vi havas dubojn? Paskalo multe pensis pri tiu afero kvankam, ke li estis religiema katoliko.

Paskalo (1623-1662) estis fizikisto, matematikisto kaj filozofo kiu havis maltrankvilajn pensojn pri la homaro. Li estis pesimisto. Li havis la samajn ideojn de Sankta Aŭgusteno (vidu numeron 8) : "la homo malvenkas pro siaj seksaj deziroj kaj li estas nefidinda". Li pensis, ke ni ĉiuj estas mizeraj estaĵoj kaj torturas nin per sentoj de maltrankvilo kaj senespero. Ni estas tiel etaj kaj sensignifaj, ke nia vivdaŭro kompare kun la senfina vivo post morto estas tute sensenca. Tamen, kontraŭ la aliaj filozofoj, li ankaŭ kredis, ke homo havis potencon. La Paskalo ni troviĝas ie, en la rango inter bestoj kaj anĝeloj, sed pli ofte ni proksimiĝas al bestoj.

La plej konata libro de Paskalo "Pensoj" estis kompilita el liaj fragment-verkoj post lia morto en 1670. Oni ne scias kun certeco kion li tutece provus diri al sia legantaro, sed io estas certa, ke li parolas pri defendo de sia vidpunkto pri kristanismo.

En sia maljuna aĝo li estis malsana kaj neniam korpe stronga. Oni ĉiam vidas lin kun larmantan okulojn en liaj portretoj. Sed li sukcesis multajn aferojn en sia mallonga vivo. Jam en sia juneco li inventis la barometron, li faris eksperimentojn en vakuaj spacoj, li eĉ inventis simplan kalkulilon por helpi sian patron. Li ankaŭ estis tre sukcesa matematikisto ĉefe sur la temo



de probableco. Li ne ŝatus esti taksita kiel filozofo, ĉar li vidis filozofojn kiel homoj kiuj scias malmulton. Post lia aliĝo al la

Kristana religia sekto de "Jansenismo" (*katolika penso, influita de la pensoj de Sankta Aŭgusteno-PIV*) li komencis verki pri religiaj temoj. Anoj de Jansenismo kredis je sorto kaj vivis tre stirktan vivon. Li vivis siajn lastajn jarojn kiel monaĥo kaj eĉ se li travivis grandajn dolorojn pro sia malsano li neniam haltis verkadon.

Kartezio (vidu numeron 13), kiu estis ankaŭ religiema filozofo, pensis ke la eksitadon de Dio oni povus provi per logiko, sed Paskalo pensis ke tiu estis rilata nur al homa koro kaj kredo. Por li, filozofia rezonado ne estis aplikebla sur tiu temo. Sed en sia libro "Pensoj" li inventis genian argumenton pri la ekzistado de Dio, kiun li bazis sur probableco kaj estas nomita "Veto de Paskalo". Laŭ tiu argumento, se vi estas kartludanto, vi devas kalkuli la probablecon de venko kaj malvenko. Do, se Dio ne ekzistas, pro kredo je Dio, vi perdas nenion, sed se Dio ekzistas, pro ne kredo je Dio, vi povas perdi multon. Alivorte, "se vi gajnos vi gajnos ĉion, sed se vi perdos vi perdos nenion". Ĉi tie la gajno estas la post morta vivo en paradizo. Do, eĉ se la probableco estus tre malgranda, la plej bona veto en tiu ludo estus kredi je la ekzistado de Dio. Se vi ne kredas je io, pretendi, ke tio ekzistas, estas tute ne logika afero. Tamen Paskalo havis respondon pri tio. Se vi kredas, ke la plej bona movo estas kredi ke Dio ekzistas, vi povas pretendi ĝuste tiel, kiel la kredantoj faras, poste dum tempo viaj pensoj kaj kredo fortiĝos kaj vi fariĝos kredanto je Dio.

Tamen, ĉu por Dio valorus tiuj, kiuj pretendas, ke Li ekzistas kvankam ili ne kredas je Li? Ĉu tiuj homoj ne estus homoj kun intereso je tiu afero? Plue, lia "veto" estas bazita nur sur kristana Dio kaj nenio. Kio se la pli ĝusta kredo estus iu alia religio?

**(daŭrigota)**





## EL UNUA PARTO - TAŬO

14



Oni rigardas ĝin kaj ĝin ne vidas:  
Ĝia nomo estas Ĝerma.  
Oni aŭskultas ĝin kaj ĝin ne aŭdas:  
Ĝia nomo estas Fajna.  
Oni kaptas ĝin, sed ĝin ne perceptas:  
Ĝia nomo estas Malgranda.  
Tiun triopon oni ne povas disigi,  
tial ili miksite formas tuton.  
Ties supro ne estas hela,  
ĝia malsupro ne malhela.  
Ĉar ĝi fontas sen interrompo,  
oni ne povas doni nomon al ĝi.  
Ĝi reiras en la Neekzistantan.  
Jen la senforma formo,  
la senaĵa bildo.  
Jen la malhele kaosa.  
Irente renkonte al ĝi, oni ne vidas ties aspekton,  
sekvante ĝin, oni ne vidas ĝian dorsan flankon.  
Se oni firmtenas la TAŬO-n de la praa tempo  
por regi la nunan Estadon,  
jen oni povas scii la praan komencon.  
Tio estas la seninterrompa fadeno de l' TAŬO.

### Rimarkoj de Cezar

La tri ecoj Ĝerma, Fajna kaj Malgranda celas ion, kio ne estas kaptebla per la limigitaj sensoj, do spiritan, subkonscian, sed ankaŭ materian tian, kia ne percepteblas de ni. Oni neniam forgesu, ke la fruaj filozofoj ne disigis la materion de la spirito, sed ili ankoraŭ komprenis ĝin kiel unuecon. TAŬO ne estas nur senco, kiel tradukis Vilhelmo ĝin erare, sed animita materio. La kvar lastaj frazoj sugestas, ke la pasinteco kaj la estanteco estas dekomence neinterrompeble kunigitaj. La TAŬO etendiĝas el la pasinteco ĝis la nuno. Se ni penetras en la pasintecon, ni povas kompreni la nunon. TAŬO estas nek nur la efiko de kaŭzoj nek nur filozofia penso, ĝi estas pli ol tio.

### Rimarkoj de Anniepera

"Pri la tri terminoj en via traduko: "Ĝerma", "Fajna" kaj "Malgrando" mi leĝis artikolojn ĉine verkitajn, preskaŭ ĉiuj konservas ties antikvajn esprimojn, t.e. "Y", "Xi" kaj "Wei", kaj eĉ s-ro Wang Chongfang tradukis ilin nur per ties sencoj, t.e. "Nevidebla", "Neaŭdebla" kaj "Nepalpebla". La precizan nomon oni ja ne facile povas akiri."

(daŭrigota)

## Donaco por Kristnasko: Mesio de Händel – en Esperanto



La Mesio en Esperanto: unika evento en la kultur-historio de Esperanto. La oratorio MESIO de

Friedrich Händel estis prezentita en Esperanto la 29-an de marto en 1987 fare de la fama 100-membra neesperantista koruso de Centra Ensemblo de KISZ.

La koncerto estis parto de la neesperantista projekto "Budapeŝta Printempa Festivalo", kies direktoro Lengyel Márton estis esperantisto. La koncerto mem okazis en unu el la plej elegantaj urbocentraj koncertejoj "Vigadó" en Budapeŝto, kie la spektejo estis plenŝtopita de esperantistoj. Szilvási László prizorgis la sonregistradon de la koncerto, kiu estis eldonita tiam de lia entrepreno "Lingvo-Studio" en muzika sonkasedo kiel historia dokumento de nia esperantista kultur-historio.

La sonkasedo jam de multaj jaroj ne plu estas aĉetebla. Ĉi jare la eldonejo decidis liberigi la sondosierojn en la originala kvalito por libera uzo - do ili staras nun je via ĝuo kiel senpaga kristnaska donaco de la eldonejo.

Aŭskultu la koncerton ĉe:

<http://www.eventoj.hu/mesio/>

Pri la "Projekto Mesio" Roberto Poort kompilis apartan retpaĝon ĉe lia Aŭd-Vida Studio ĉe


<http://novajhoj.weebly.com/mesio-projekto.html>

-----

- Muziko: Kamerorkestro de Hungara Ŝtata Koncertensemblo
- Kanto: Universitata Koruso de Centra Ensemblo de KISZ
- Solkantistoj: Verebics Ibolya (soprano), Pánczél Éva (aldo), Szilágyi Béla (baso), Márk László (tenoro)
- Korusa estro: Hollerung Gábor
- Arta gvidanto: Bohus Gábor
- Tradukinto: Szabó Imre
- Sonregistrado: Lingvo-Studio 1989, Szilvási László.

Fonto: Novajservo Ret-Info / Lingvo-Studio





1

“Mia mono! Mia tuta mono malaperis!”

Juna Rikardo preskaŭ ploris ĉe tiu terura konstato. Li rondrigardis. En la dormejo, li estis sola. Videble, ne nur lia mono malaperis, sed ankaŭ Janĉjo. Timiga penso lin trafis:

ĉu tiu prenis ĝin? Estis apenaŭ kredeble. Janĉjo, tiu plaĉa, helpema amiko...

Ne tuj li rimarkis la paperon, sur kiu lia nomo estis skribita. Kiam li ekvidis ĝin, lia koro ekbatis kun iom da espero: letero de Janĉjo, kiu, sendube, ĉion kontentige klarigos.

Ne longe vivis la espero. La skribaĵo rapide ĝin disbatis morta:

“Kara Rikardo,  
*“Normale mi devus forkuri kun via mono kaj veturbileto sen diri al vi ion ajn. Sed miaj amikaj sentoj tion malhelpas, kaj mi volas skribi adiaŭon al vi. Mi sentas devon instrui vin pri la vivo. Se je la aĝo de 21 jaroj vi ankoraŭ ne komprenis la riskojn, al kiuj vi vin elmetas, iu devas vin lernigi. Ni hazarde renkontiĝis nur antaŭ tri tagoj. Vi sciis nenion pri mi. Tamen vian tutan vivon vi rakontis kaj... montris al mi vian tutan monon.  
 “Sciu, ke ne sufiĉas aspekti fidine por esti fidinda. Oni ne fidu nekonaton, kaj oni ne konas homon post nur tri tagoj. Dum mi skribas ĉi tion, vi dormas pace, eĉ kun rideto sur via kara, honesta vizaĝo. Sed la okazo estas tro bela. Mi iras for. Dankon pro la mono. Ankaŭ la bileto utilos, dankon. Espereble vi memoros mian instruon. Adiaŭ!”*”

Iu alia verŝajne kolerus. Sed ne Rikardo. Li nur ploris. Ne gravis, ke oni rigardas lin viro, ĉar li estas 21-jara, kaj ke, laŭdire, viro devas povi elporti malfacilaĵojn sen plori. Rikardo ne sentis sin hejme en sia 21-jareco. Li sentis sin tiel eta! Feliĉe, ke troviĝis neniu en la dormejo de la junulgastejo. Se ĉeestus aliuloj, li ne allasus sin plori. Sed sola li estis, kaj povis esti si mem.

“La aĉulo!” li fine diris mallaŭte, sed en tiu esprimo estis pli da kompatato al si ol da kolerato al Janĉjo. Li estis kiel homo, kiu ricevis baton sur la kapon kaj dum

kelka tempo ne plu povas pensi. La ideo turni sin al la polico venis al li nur malrapide.

2

“Vi do eĉ ne konas lian familian nomon?”

“Ne. Mi nur scias, ke li nomiĝas Janĉjo.”

“Nigra hararo iom longa, brunaj okuloj. Kompreneble. Se vi scius, kiom da tiaj estas...! Alta, vi diris. Kiom?”

Precizeco neniam troviĝis inter la ĉefaj ecoj, per kiuj eblas priskribi la rikardan personecon. Li hezitis. Por kontentigi la policanon, li diris ion ajn:

“185 centimetrojn.”

“Kaj kiom li pezas, viaopinie? Vi diris, ke li estas maldika.”

“Jes, li estas tre maldika, sed mi havas neniun ideon pri la pezo. Kiel mi povus scii?”

La malafabla rigardo policana ne estis facile elportebla. Refoje la knabo diris ion ajn:

“Eble 70 kilogramojn.”

“Nu, bone. Estas plej dubinde, ke ni trovos lin, sed... kiu scias?” la policano diris. Kaj kvazaŭ tio ne estus per si mem jam sufiĉe senesperiga, li aldonis: “Ĉiaokaze, kun la baldaŭa renkontiĝo de ŝtatestroj en nia urbo, ni povos fari nenion antaŭ kelkaj tagoj.”

Al Rikardo la situacio tute ne plaĉis. Li venis por ricevi helpon, kaj oni rilatis al li preskaŭ malafable. Dum li bezonis kompaton, tiu policano estis kvazaŭ senkora. La knabo sentis sin iu speciala, sed por lia vid-al-vidulo li estis nur unu inter miloj da similuloj. La ŝtatestra renkontiĝo ne helpis. Pro ĝi ĉiuj nervoj estis streĉitaj en la polico.

“Kion mi nun faru?” li demandis. “Mi ne havas monon por reveturi hejmen, aŭ eĉ por telefoni.”

“Nu, knabeto, ne estas mia problemato. Mi ne scias. Iru al via konsulejo, eble.”

(daŭrigota)





## Kuiru kun mi

### FLORBRASIKO GRATINITA

Saluton geamikoj! Hodiaŭ ni kuiras tre rapidan kaj facilan recepton ke mia koramiko instruis min... ĉu vi estas pretaj?



### INGREDIENCOJ

- 1 florbrasiko
- ½ litro da lakto
- 50 gramoj da butero
- 50 gramoj da faruno
- salo
- nigra pipro
- parmezano
- muskato
- ŝinko en pecoj
- mocarelo fumaĵita

Purigu la florbrasikon, dividu ĝin en floretoj kaj boligu ĝin en multe da bolanta akvo.

Dume preparu la beŝamelon. Vi devas kunigi la farunon al la fandita butero kaj miksi daŭre. Kiam la kunmetaĵo estos malhela, kunigu iom post iom la lakton, lasu la beŝamelon laŭ fajro malalta ĝis kiam ĝi estos densa. Metu la salon, la nigran pipron kaj la

muskaton depende de via gusto.

Makulu fajrorezistan poton kun la butero, poste distribu unuforme sur la fundo la floretojn de la florbrasiko. Aldonu la ŝinkon kaj la mocarelo fumaĵita tranĉitajn en pecoj. Kovru ĉion kun la beŝamelo kaj la parmezano.

Baku ĝin en la forno al 180°C por ĉirkaŭ 15/20 minutoj ĝis kiam estos formiĝinta krusto.

La tagmanĝo estas preta! Bonan apetiton! .

**Bonan apetiton!**

### Fonto:

<https://kuirukunmi.com/2014/01/27/florbrasiko-gratinita/>

<b>Vortareto</b>		florbrasiko	karnibahar	kunmetaĵo	kariŝim
beŝamelo	beŝamel sos	forno	fırın	makuli	lekelemek
densa	kıvamlı	fumaĵita	füme edilmiş	malhela	koyu renkli
depende	dayanarak	fundo	dip	mocarelo	italyan peyniri
distribui	daĝıtmak	gratinita	gratine edilmiş	muskato	hint cevizi
fajrorezista	ateŝe dayanıklı	gusto	zevk	parmezano	italyan peyniri
fandita	erimiş	koramiko	erkek sevgili	ŝinko	füme domuz eti
faruno	un	krusto	kabuk	unuforme	eşit şekilde

<b>Vortareto</b>		elporti	taşımak	personecon	kişilik
aĉulo	berbat herif	fidinda	güvenilir	rikarda	Rikardo'ya ait
allasus	bırakırdı	honesta	dürüst	rondrigardi	dairesel bakmak
apenaŭ	hemen hiç	junulgastejo	genç misafirhanesi	sendube	şüphesiz
baldaŭa	yakında gelecek olan	kompato	anlayış	sola	yalnız
ĉiaokaze	her çeşit durumda	konstato	farkında olma	ŝtatestroj	devlet yöneticileri
devo	görev	konsulejo	konsolosluk	timiga	korkutan
disbatis	vurup savurmak	kontentige	tatmin edici şekilde	verŝajne	muhtenelen
dormejo	yatakhane	laŭdire	söylenildiğine göre	veturbileto	seyahat bileti
dubinde	şüphe edilir	malfacilaĵo	zorluk	vid-al-vid-ulo	karşılıklı olunan kişi
ekbati	vurmaya başlamak	malhelpi	engellemek	videble	görülebilir
elmeti	çıkarıp koymak	nekonato	yabancı		



**Pri la uzado de «h» anstataŭ supersigno**

La uzado de ch k.t.p. anstataŭ ĉ k.t.p. estas enkondukita nur por la presejoj, kiuj ne havas ankoraŭ literojn kun signetoj, sed en skribado mi konsilas al vi ĉiam uzi pli bone ĉ anstataŭ ch, ĉar la uzado de unu litero por unu sono estas multe pli logika ol la uzado de du literoj. Vi diras, ke la signetoj superliteraj estas maloportunaj en la skribado; sed la alfabeto pure latina havas ja ankaŭ kelkajn literojn kun signetoj superliniaj (i, j, t), kaj la plej granda parto de la lingvoj kiuj uzas la alfabeton latinan havas ankoraŭ amason da aliaj literoj kun signetoj superliniaj kaj subliniaj. Certe ia akademio aŭ kongreso penos iam elpensi pli oportunajn skribajn formojn por kelkaj literoj (ĉar ne sole la literoj kun signetoj sed ankaŭ multaj aliaj literoj havas formon tre maloportunan); sed tio ĉi estas jam tute alia demando, kiu la lingvon mem tute ne tuŝas: ĝi estas ne demando de lingvo, sed nur demando de oportuneco de la skribado.

**La Esperantisto, 1889, p. 15.**

Multaj plendas, ke la skribado per ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, kaj ŭ estas por ili neoportuna kaj malhelpas ilin ankaŭ en la presado de verketoj en iliaj lokoj, kie la presejoj ne havas la literojn kun signetoj. Ni ripetas tial tion, kio estis jam dirita en la «Aldono al la Dua Libro»: anstataŭ la signeto superlitera oni povas kuraĝe uzadi la literon h kaj anstataŭ ŭ — simplan u.

**La Esperantisto, 1890, p. 32.**

Sinjoro F.-V. Lorenc konsilas, ke la presejoj, kiuj ne havas la signetojn superliterajn, uzu anstataŭ ili kaj anstataŭ h — apostrofon returnitan post la litero; ekzemple «ac'eti» anstataŭ «aĉeti» aŭ «acheti». De nia flanko ni devas nur peti, ke se oni volos uzi tiun ĉi konsilon, oni ne forgesu klarigi en la komenco de la presata verko la signifon de tiu ĉi returnita apostrofo.

**La Esperantisto, 1890, p. 54-55.**

Vane vi timas, ke ni volas enkonduki novan ortografion (h anstataŭ signeto superlitera). La fina leĝo por nia ortografio estos: «por unu sono unu litero»; kaj kiam ni nur povos, ni ĉiam uzados ĉ anstataŭ ch (povas nur esti, ke iom poste, por pli oportunigi la skribadon, ni donos al tiu ĉi litero pli simplan formon). La skribado de unu sono per du literoj estas tute ne logika kaj neniam povus esti aprobata; sed ni ĝin uzas nur kiel

necesan unuatempan rimedon por doni al ĉiuj presejoj kaj al la telegrafo la eblon labori jam nun en nia lingvo. Sed kiam iom post iom la plej granda parto de la presejoj kaj telegrafejoj proviziĝos je nia alfabeto, tiam la uzado de superflua h estos absolute ĉesigita. Ne la ĉ estas transira ŝtupo al ch, sed en la ch ni proponis transiran ŝtupon al ĉ, kiam ni vidis, ke la absoluta enkonduko de ĉ estas ankoraŭ teĥnike ne oportuna. Tute vere vi diras, ke la presejoj kaj telegrafoj devas sin konformigi al la lingvo, kiun ili uzas, kaj ne la lingvo al ili; sed

nia lingvo estas ankoraŭ juna kaj nepotenca kaj devas sin fleksi, se ĝi ne volas pereji. Ne estas ankoraŭ tempo diri fiere al ĉiuj presistoj: «Se vi ne volas vin konformigi al ni, ni vin ne bezonas!» La unuatempa permeso presi per h estas necesa rimedo por ne fari ofte la presadon de ia verko tute ne ebla aŭ tro multekosta; sed kiu nur havas la eblon presi per signetoj superliteraj, tiu ĉiam devas ĝin fari.

**La Esperantisto, 1891, p; 15.**

La literojn de nia alfabeto mi proponas nomi en la sekvanta maniero: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.

**Esperantisto, 1893, p. 32.****Pri sensupersigna skribado**

La fundamentaj reguloj de nia lingvo permesas presi «h» anstataŭ supersigno; sed kio estas permesata por presado, tio ankaŭ estas permesata por skribado. Tiel same, kiel neniu povas protesti, se vi skribos ekzemple per artifikaj gotaj literoj anstataŭ per literoj ordinaraj, aŭ per literoj presaj anstataŭ skribaj, tiel same ankaŭ neniu povas protesti, se vi skribos per «h» anstataŭ supersignoj. Sed la demando estas, ĉu viaj korespondantoj estos kontentaj, se, skribante al ili, vi uzos la pli artifikan manieron kun «h» anstataŭ la pli simpla kun supersignoj. Tio ĉi sekve estas ne demando de permeso aŭ malpermeso, sed simple demando de gusto. Sed, se vi deziras anstataŭigi la supersignon en «ĉ» kaj «ŝ», vi nepre devas anstataŭigi ĵ in ankaŭ en «ĝ», «ĥ» kaj «ĵ», ĉar ĉiu el la ambaŭ skribmanieroj aparte estas permesita en nia lingvo, sed uzado de ia skribmaniero miksitaj estus jam arbitraĵo kaj kondukus al ĥaoso. — Se vi volas skribi per «h» anstataŭ supersignoj, vi povas tion fari, ne bezonante demandi ies permeson; sed se vi volas uzi



skribmanieron miksitajn, aŭ - tiom pli - se vi volas uzi sisteme la tute novajn literojn «y» kaj «w», anstataŭ «j» kaj «ŭ» (mi ne parolas pri specialaj teknikaj okazoj, kiam tio eble estas necesa) vi devas - se vi deziras esti lojala Esperantisto kaj ne enkonduki anarĥion en nian aferon - akiri por tio la permeson de la «Lingva Komitato». Formulu klare vian deziron kaj prezentu ĝin al la voĉdonado de la Lingva Komitato, kaj se via propono estos akceptita per plimulto da voĉoj, ĝi fariĝos permeso oficiala. Sed memoru, ke pro la bono de nia afero la Lingva Komitato devas esti tre singarda kaj akcepti nur tion, kion ĝi trovas tute sendanĝera, efektive grava kaj sendube utila; tial se la Komitato malakceptos vian proponon, submetu vin discipline al ĝia decido kaj ne agu simile al tiuj personoj, kiuj, ne ricevinte aprobon de la Komitato, krias, ke la Komitato

nenion taŭgas, ke ĝi ne estas aŭtoritata, ke ĝi nenion faras, k.t.p. — Principe la Lingva Komitato havas la rajton permesi en la lingvo ĉion, kion ĝi trovas necesa; mi neniam prezentos ian malhelpon, kaj ĉiun mature pripensitan kaj orde voĉdonitan decidon de la Komitato mi akceptos sendispute. Sed mi opinias, ke la vera celo de la Lingva Komitato tute ne konsistas en ia facilanima eksperimentado sen grava neceseco; ju malpli ni okupos niajn kapojn per diversaj «plibonigoj» kaj ju pli ni simple propagandos kaj riĉigos la lingvon, des pli bone estos.

**Respondo 45, La Revuo, 1908, Aŭgusto**

## Internacia Tago de la Gepatra Lingvo



**INTERNACIA TAGO DE LA  
GEPATRA LINGVO**  
La 21 -a de februaro 2017

Diverseco lingva kaj kultura estas probable nia plej granda sanco por la futuro: por kreemo, novigo, inkluziveco. Ni ne malsparu gin!

La internacia lingvo Esperanto respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturajn diversecon tra la mondo.

Pri lingvoj: [www.lingvo.info](http://www.lingvo.info)

Pri interreta komunikado: [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) ,  
[www.uea.org](http://www.uea.org)

### 21a de februaro – Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako, ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo (Banglujo) plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo, la bengala (bangla / bn / বাংলা ভাষা ), kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo «pli granda», parolata de la fortuloj de tiu momento.

Temas pri io, kio ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio. Ne nur en Banglujo, sed ankaŭ en pluraj eŭropaj landoj, kiel ekzemple en Nederlando, kie la registaro en 2015 aprobis planojn por laŭgrada forigo de la pozicio de la angla lingvo en la instruado - malfavore al la lokaj gepatraj lingvoj. (1.)

Tiuj ne estis unikaj okazaĵoj. Kaj en Banglujo kaj en Nederlando temas pri la sama logiko: «mi estas la fortulo, vi silentu kaj eventuale, se vi volas paroli, vi parolu mian lingvon». Aliflanke kiel ĉiuj lingvistoj diras al ni (ni citas unu el ili, Ken Hale): «Kiam lingvo mortas, ni perdas grandan intelektan riĉecon, kvazaŭ oni faligis bombon sur la muzeon Louvre.»



Krom la socia maljusteco, kiu okazas kiam ies gepatra lingvo estas malrespektata, necesas konscii pri la fakto, ke biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj, interkonektitaj kaj unu de la alia dependantaj. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj esence necesaj por daŭripova biodiverseco, por la vivo. (Fina deklaro, 64a UN-NRO-konferenco, Bonn, 2011 (2.) kaj Terralingua (3.))

Je la 17-a de novembro 1999 Unesko proklamis la 21-an de februaro la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. En 2007 ankaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (4.) alvokis la membroŝtatojn por «Antaŭenpuŝi la konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la popoloj de la mondo.», samtempe



deklarante la jaron 2008 Internacia Jaro de Lingvoj. En 2014 Unesko aperigis en sia retejo ankaŭ Esperanto-lingvan version de la mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro, Irina Bokova (5.)

Kiel rilatas al ĉio ĉi Esperanto? La du aferoj ja rilatas inter si, ĉar la kernaj valoroj de ĉi tiu tago, la multilingveco kaj la rajto de ĉiu homo paroli sian gepatran lingvon, estas ankaŭ la valoroj kiujn la movado por Esperanto defendas. Ni, la esperantistoj, volas neniun lingvon malaperigi, ni volas, ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj regu lingva justeco. Ĉi-cele de multaj jaroj Universala Esperanto-Asocio (UEA) solene kunfestas ĉi tiun tagon, interalie por substreki ke Esperanto ne estas eliminanto de lingvoj, kiel estas uzataj la lingvoj de grandaj ekonomiaj kaj militistaj potencoj.

Esperanto, fakte estas protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj, kiel diris s-ino Vigdis FINNBOGADOTTIR (prezidanto de la Respubliko Islando, 1980-1996): «Estas jam tempo ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povus iĝi vera remparo por iliaj kulturoj kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj, kiel hodiaŭ tio pli kaj pli evidentiĝas. Mi sincere esperas, ke Esperanto rapide progresos por helpi ĉiujn naciojn de la mondo.» (6.)

Eble iu ankoraŭ demandas: «Kial ĝuste Esperanto?». La kialo estas simpla. Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj sistemoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas nur bonvolaj homoj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en paco inter la popoloj.

«Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiu lingvo estas la celo, al kiu esence kontribuas Esperanto.» (Prof. Robert Phillipson (7.)). Esperanto estas ilo akcelanta atingon de justa komunikado kaj tiel de justaj rilatoj inter etnoj, kulturoj, popoloj. «... Mi esperas, ke Esperanto daŭrigos la plenumadon de tiu duflanka rolo subtenante diversecon kaj kreante unuecon.» (Rita Izsák, Speciala Raportanto de UN. (8.))

Sekve Esperanto helpas ĉiujn pluvivigi sian lingvon. Ĉi tiu estas la klara mesaĝo, kiun esperanto-parolantoj el la tuta mondo volas sendi al ĉiuj tutmonde, la 21-an de februaro.

**Fonto:**

[http://uea.org/vikio/21a\\_de\\_februaro\\_%E2%80%93\\_Internacia\\_Tago\\_de\\_la\\_Gepatra\\_Lingvo](http://uea.org/vikio/21a_de_februaro_%E2%80%93_Internacia_Tago_de_la_Gepatra_Lingvo)

## Bjalistoka Urba Konsilantaro rifuzis celebri la Zamenhof-jaron



La urba Konsilantaro de Bjalistoko rifuzis celebri en 2017 la Zamenhofan Jaron, proklamitan de Unesko okaze de la centjariĝo de la forpaso de la iniciatinto de Esperanto, kiu naskiĝis en tiu urbo, en la nordorienta parto de Pollando.

Lazaro Ludoviko Zamenhof, naskiĝinta en la 15-a de decembro 1859 en Bjalistoko, en juda familio, kreis la bazojn de la internacia lingvo Esperanto por ebligi komunikadon inter ĉiuj popoloj de la mondo. Li, kiu profesie laboris kiel kuracisto, forpasis en la 14-a de

aprilo 1917, en Varsovio.

Laŭ la prezidento de Bjalistoka Esperanto-Asocio, Przemyslaw Wierzbowski, intervjuita de la franca novaĵagentejo AFP, konsilantoj de la konservativa partio Rajto kaj Justico (PiS, kiu nuntempe regas Pollandon) voĉdonis kontraŭ la celebrado de Zamenhofa Jaro. La fina rezulto estis 12 voĉoj malfavoraj kontraŭ 11 favoraj al la propono.

Laŭ Wierzbowski, la konsilantoj de PiS konsideras la ideon de Zamenhof tute utopia kaj taksas Esperanton kiel senvalora lingvo. La raporto de AFP, tamen, substrekas ke Esperanto atingis grandan sukceson tutmonde, fariĝis parolata en la tuta planedo, kaj laŭ lingvistoj nuntempe ĉirkaŭ miliono da homoj ĝin parolas en ĉiutaga vivo (la menciita datumo ne temas pri kiom da homoj scipovas la lingvon, sed nur pri tiuj, kiuj efektive uzas ĝin sufiĉe ofte)

La proparolanto de PiS en la urba konsilantaro, Konrad Zieleniecki, deklaris al AFP, ke Zamenhof estis "elstara Bjalistokano, kiu meritas tiun honoron". Li



tamen klarigis sian voĉon per la argumento, ke estis antaŭe decidite, ke en 2017 Bjalistoko celebros la "Jaron Jozef Pilsudski", okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de la patro de pola sendependiĝo.

Aliflanke, Zieleniecki agnoskis, ke tio ankaŭ rilatas al loka politika disputo inter PiS kaj la urbestro, Tadeusz Truskolaski, kiu "klopodas uzi Zamenhofon por politikaj celoj".

Kelkaj aliaj homoj, tamen, klarigas la decidon de la konsilantaro surbaze de "malfavora etoso, ene de PiS, por ĉio fremda al pola tradicia kulturo".

(AFP)

Tradukis: Rafael Henrique Zerbetto

Fonto: [http://www.espero.com.cn/2016-12/22/content\\_39965552.htm](http://www.espero.com.cn/2016-12/22/content_39965552.htm)

## Bonan apetiton, sinjoro kuniklo

## Facila rakonteto



Saluton, mi proponas rakonti al vi historieton, uzante la internacian lingvon, kiu nomiĝas Esperanto.

Bonan apetiton, sinjoro Kuniklo!

Sinjoro Kuniklo ne plus ŝatas karotojn. Li forlasas sian domon por rigardi en la telero de siaj najbaroj.

- Kion vi manĝas? li demandas al la rano.
- Mi manĝas muŝojn, ŝi respondas.
- Fi! diras sinjoro Kuniklo.
- Kion vi manĝas? li demandas al la birdo.
- Mi manĝas vermojn, respondas la birdo.
- Fi! diras sinjoro Kuniklo.
- Kion vi manĝas? li demandas al la fiŝo.
- Mi manĝas larvojn, respondas la fiŝo.
- Tio ne plaĉas al mi! diras sinjoro Kuniklo.
- Kion vi manĝas? li demandas al la porko.
- Mi manĝas kion ajn, respondas la porko.
- Nu, ne mi! diras sinjoro Kuniklo.

- Kion vi manĝas? li demandas al la baleno.
- Planktonon, respondas la baleno.
- Kio estas tio? diras sinjoro Kuniklo.
- Kion vi manĝas? li demandas al la simio.
- Bananojn, respondas la simio.
- Tio ne kreskas en mia ĝardeno, diras sinjoro Kuniklo.
- Kion vi manĝas? li demandas al la vulpo.
- Mi manĝas kuniklon! respondas la vulpo.
- Help! ekkrias sinjoro Kuniklo.

La vulpo eksaltas al li por manĝi lin. Sed li nur sukcesas krakmanĝi liajn orelojn. Timotremanta sinjoro Kuniklo rapide eniras hejmen. Ĉar la karotoj kreskigas la orelojn de la kunikloj, li preparas por li dikan marmiton el ili. Li trovas tion bongusta!

Tiun ĉi porinfanan rakonteton prezentas Claude Labetaa el Francio

Fonto:

<http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2015/12/bonan-apetiton-sinjoro-kuniklo.html?view=snapshot>

Vortareto		florbrasiko	karnibahar	kunmetaĵo	karişım
beŝamelo	beŝamel sos	forno	fırın	makuli	lekelemek
densa	kıvamlı	fumaĵita	füme edilmiş	malhela	koyu renkli
depende	dayanarak	fundo	dip	mocarelo	italyan peyniri
distribui	daĝıtmak	gratinita	gratine edilmiş	muskato	hint cevizi
fajrorezista	ateşe dayanıklı	gusto	zevk	parmezano	italyan peyniri
fandita	erimiş	koramiko	erkek sevgili	ŝinko	füme domuz eti
faruno	un	krusto	kabuk	unuforme	eşit şekilde

## La jarkompasso - Fermu 2016 Planu 2017

## elŝutu senpage



### Nun en Esperanto!

La JarKompasso estas tutmonda movado, kiu motivas homojn ordigi sian pasintan jaron kaj plani sian sekvan jaron. Vi povas plenigi ĝin sole, aŭ organizu eventon - invitu viajn amikojn al via hejmo, aŭ kafejo

kaj plenigu la libreton kune.

Kontaktu nin ĉe [hello@yearcompass.com](mailto:hello@yearcompass.com), ni respondos ĉiujn leterojn.

**Elŝutu gin senpage ĉe:**  
<http://yearcompass.com/eo/>



## Esperanto Kursu (14)



### Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi

açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin (" - ") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

## LA KAŜ-LUDO

Onklino Viktorino kaj Onklo Alberto havas nur du infanojn - Petro kaj Raĉelo.

Petro estas knabo. Raĉelo estas knabino.

Petro estas la kuzo de Roĝero, Ŝila, kaj Johano.

Raĉelo estas ilia kuzino.

\* \* \*

Lun tagon Petro kaj lia fratino venis por ludi kun siaj tri ge-kuzoj.

Sed ho, ve! Kiel malbona estis la vetero! Kiel pluvis!

La kvin infanoj devis ludi en la ludoĉambro. Ili ne povis ludi en la ĝardeno. La herbo estis tro malseka.

(Nek Petro ne Raĉelo estis malseka, ĉar Raĉelo havis ombrelon.)

"Ni ludu 'Kaŝu kaj Serĉu'," diris Ŝila.

"Ho, jes, jes!" kriis la aliaj infanoj. "Ni ludu 'Kaŝu kaj Serĉu!'"

"Mi volas min kaŝi," diris Ŝila.

"Mi ankaŭ," diris Raĉelo.

"Kaj mi!" "Kaj mi!" diris Petro kaj Johano.

"Bone! Mi serĉos," diris Roĝero.

\* \* \*

Roĝero devas fermi, siajn okulojn kaj kalkuli de unu ĝis cent. "Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, dek unu, dek du, dek tri, dek kvar, dek kvin, dek ses, dek sep, dek ok, dek naŭ dudek.

Dudek unu, dudek du, dudek tri, dudek kvar ... tridek.

Tridek unu, tridek du, tridek tri, tridek kvar ... kvardek ... kvindek ... sesdek ... sepdek ... okdek ... naŭdek ... cent!"

Tiam Roĝero pov-as komenci serĉi.

Roĝero kalkulas de unu ĝis cent, kun ferm-itaj okuloj.

Tiam li malfermas siajn okulojn, kaj komencas serĉi.

Kie estas Ŝila?

Ŝi estas sub la tablo. Roĝero serĉas ĉie, sed li ne povas trovi ŝin.

Kie estas Johano?

Li estas sub la lito. Roĝero serĉas ĉie, sed li ne povas trovi lin.

Kie estas Raĉelo?

Ŝi estas en la tepoto. Roĝero serĉas ĉie, sed li ne povas trovi ŝin.

Kie estas Petro?

Li estas en la kruĉo. Roĝero serĉas ĉie, sed li ne povas trovi lin.



Ho, ve! Roĝero ne povas trovi iun ajn.

Tiam Ŝila elvenas de sub la tablo; Johano elvenas de sub la lito; Petro elvenas el la kruĉo;

Raĉelo elvenas el la tepoto, kaj Roĝero kaptas ĉiujn!

Tiam Roĝero sin kaŝas. Nun Raĉelo devas serĉi, ĉar ŝi estis kaptina unue.


La infanoj multe ŝatas ĉi tiun ludon.

Ili sin kaŝas jen sub la lito, jen sub la tablo, jen mal-antaŭ la kurtenoj, jen mal-antaŭ la pordo.

Iam la hundo ankaŭ ludas "Kaŝu kaj Serĉu," sed la katino neniam.

## Sözlük

banan-arbo	muz-aĝaci
blovas	esiyor, üflüyor(fiilin
mastar	formu:blovi, esmek,
üflemek)	
branĉo	dal
de-preni	bir ŝeyden bir ŝey
almak, kopartmak	
frukt-arbo	meyva aĝaci
frukto	meyva
ge-sinjoroj	bay ve bayan
grimpas	tirmanıyor (fiilin mastar
formu:grimpi,	tirmanmak)
loĝis	yaşadılar, ikamet ettiler
(fiilin mastar	formu: loĝi, ikamet
etmek)	
oranĝ-arbo	portakal aĝaci
pir-arbo	armut aĝaci
pom-arbo	elma aĝaci
prun-arbo	erik aĝaci
rajtas	hakkı var (fiilin mastar
formu: rajti,	hakkı olmak)
vento	rüzgar



## Ekler:

-ge Her iki cinsi birden belirtir, erkek cins üzerinden kurulur ve her zaman çoğuldur. örnek:

ge-patroj=anne+baba, ebeveynler, ge-sinjoroj=beyer bayanlar, bo-ge-patroj=kayınpederler

-uj ŭlke isimlerinin oluşturulması için kullanılır. Angl-ujo (İngiltere) Turk-ujo (Türkiye) (ujo=kap, içinde bir şey barındıran şey anlamındadır)

de- Bu önek fiile "bir ŝeyden" yapmak anlamını katar (ör. preni/depreni=almak/bir ŝeyden almak, kopartmak)



## Kapaniŝ



### Nazim Hikmet: Poezia Antologio Serio Oriento-Okcidento, n-ro 51

(TR) Kitaptan bir ŝiir orneĝi. Satin alma seĝenekleri için lütfen sayfa 2'ye bakınız.

Kitap ŝimdi elektronik formda da piyasada.

(EO) Jen poem-ekzemplero el la libro. Por aĉeteblecoj bonvolu rigardi paĝon 2. La libro nun estas ankaŭ aĉetebla en elektronika formo.

#### 53 Kar yaĝiyori

Lambayı yakma, bırak,  
sarı bir insan başı  
düşmesin pencereden kara.  
Kar yaĝıyor karanlıklara.  
Kar yaĝıyor ve ben hatırlıyorum.  
Kar...  
Üflenen bir mum gibi söndü koskocaman ışıklar...  
Ve şehir kör bir insan gibi kaldı  
altında yaĝan karın.

Lambayı yakma, bırak!  
Kalbe bir bıçak gibi giren hatıraların  
dilsiz olduklarını anlıyorum.  
Kar yaĝıyor  
ve ben hatırlıyorum.

— 172 —

#### 53 Neĝadas

Ne ekbruligu la lampon, lasu ĝin!  
Flava homa kapo<sup>1</sup>  
ne elfalu el la fenestro kiel nigra ombro.  
Neĝadas sur la mallumojn.  
Neĝadas kaj mi rememoras.  
Neĝo ...  
Kiel forblovita kandelo la grandaj lumoj estingiĝis...  
Kaj la urbo restis kiel blinda persono  
sub la falanta neĝo.

Ne bruligu la lampon, lasu ĝin!  
Pri la memoroj, kiuj eniras la koron kiel tranĉilo,  
mi komprenas, ke ili estas mutaj.  
Neĝadas,  
kaj mi rememoras.

<sup>1</sup> Nazim Hikmet parolas pri sia propra blonda kapo.

— 172 —

### (daŭrigita el paĝo 13)

Se vi interesiĝas pri kandidatiĝo, bonvolu sendi vian kandidatiĝon (vivresumon kaj motiveleteron) al [direktoro@co.uea.org](mailto:direktoro@co.uea.org) ĝis la 20-a de januaro 2017 plej laste, indikante:

\* kiuj taskoj interesas vin (kompreneble, se vi rimarkas ke mankas tasko en la listo, kaj vi pensas ke indus ĝin plenumi, nepre menciu ankaŭ tion)

\* kiom da tempo vi planas elspezi por tiuj taskoj

\* kiajn rimedojn kaj rekompencojn vi bezonus, kaj kiom ili kostus



Solvo de la kruĉvort-enigmo



		O	T	I		T		O		O	R	10
O	E	R	A		O	I	G	L	A	T	O	9
O	S	I	L	I	B	T		A	L	I	A	8
N		P			A	R	O		R	A		7
	O		O	R	I	O	P	M	E		A	6
E		A				A	R	U	A	T	V	5
L			A	N	A		O	Z	A	K	U	4
O	O	O	N		A	R	A	K		M	A	3
	O		I	N	Z	O	E		R	E	P	2
												1
1	K	O	N	C	E	R	N	O				1
2												2
3	M	A	M									3
4	U	K	A	Z	O							4
5	N	A	T	U	R	A						5
6	A											6
7												7
8												8
9												9
10												10
11												11
12												12